

revuo

esperanto

majo 1966

59-a jaro

n-ro 726 (5)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

enhavo

- 81 Nur vasta subteno ebligas pluajn progresojn (Estrara kunsido)
- 82 La turka lingva reformo kaj ĝia signifo por Esperanto (Pool)
- 84 La hungara lingvo (Kalocsay)
- 88 Elektrona kompostado (Schlüter)
- 89 Respondoj al kontraŭ-Esperantaj paroloj (V.S.)
- 90 El "Songoj en dek noktoj" (Natume sooseki)
- 92 CED
- 93 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado Esperanto en radio
- 94 Recenzoj
- 96 Mallongaj novaĵoj
- 97 51-a Universala Kongreso, Budapest, 1966
- 98 La Juna Vivo
22-a IJK de TEJO, Pécs, 1966
- 99 Memoriga kalendaro
Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologo Lappi
La internaciaj konkursoj 1966
- 100 Oficiala informilo n-ro 390

kovrila bildo

"Virino" — per tiu ĉi verko s-ro Ito sotaro el Otu, Japanujo, gajnis la 2-an premion en la foto-konkurso de UEA en la kadro de la 50-a Universala Kongreso en Tokio. Por partopreni la konkurson de 1966, vidu p. 97.

bildojn liveris

- 82 (kaj 83) Ministrejo de Turismo kaj Diskonigo, Ankara
- 85 Bakonyi B.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
majo 1966

La Estraro rigardas antaŭen

La tuta Estraro de UEA, kun la escepto de s-ro Carlén (malhelpita de malsano) kaj la reprezentanto de TEJO, s-ro Tonkin, kunvenis en la Centra Oficejo en Rotterdam de la 1-a ĝis la 3-a de aprilo por sia regula frujara laborkunsido. El ĉiuj eroj de la longa tagordo elstaris kiel ĉefaj problemoj la daŭre kreskanta ŝarĝo de laboro, precipe pro la agado okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, kaj la altaj elspezoj, kiujn ĝi sekvigis.

La diskutojn partoprenis ankaŭ la Direktorino de la C.O., la redaktoro de "Esperanto" kaj la Konstanta Kongresa Sekretario.

Problema financa situacio

Superrigardo de la spezoj de la Asocio en 1965 montris, ke denove la jaro finiĝis per konsiderinda defcito. La kaŭzoj estas facile konstateblaj. Unuflanke, la lastatempa altiĝado de salajroj en Nederlando kaj de la preskostoj, kiuj ja dependas de la salajroj, ankoraŭ ne finiĝis. En la buĝeto de UEA tiuj eroj ĉiam estas la ĉefaj. Samtempe multe kreskis la agado (kaj sekve la elspezoj) de UEA sur diversaj kampoj. Oni pensu nur pri la granda kampanjo por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj, pri la unuafoja okazigo de Universala Kongreso en Azio, pri la rekorda amplekso de la Jarlibro 1965.

Aliflanke la membronombro, de kiu dependas la bazaj enspezoj de la Asocio, kreskis nur malmulte dum 1965.

Ĉiu kunhelpu, varbante membrojn

Evidente, la sola daŭra solvo de la problemo troviĝas en kreskigo de la nombro de individuaj membroj. La Estraro atentigas, ke aliĝo de mil pliaj membroj ne nur forblovas la financajn nubojn sed permesus dediĉi al konstrua, eksteren-direktita planado la tempon nun perdatan per ekonomiaj diskutoj.

Laŭ la unuaj indikoj la Kampanjo por Nova Milo, lanĉita en decembro, jam havis iom da efiko, kaj plej verŝajne la individua membronombro montros novan kreskon je la fino de la nuna jaro. Sed, frontante la defciton de 1965, la Estraro decidis agi senprokraste por, se iel eble, jam por la kuranta jaro reguligi la financan situacion. Ĝi decidis tranĉi sur ĉiuj flankoj ĉiujn ne-esencajn agadojn kaj samtempe praktiki maksimuman ŝparemon en ĉiuj esencaj aferoj. Kompreneble, tuj kiam la membronombro pli rapide altiĝos, tiam jam estos eble repreni la flankenmetitajn agadojn kaj projektojn.

Kontentiga estas la kreskanta graveco de la Fondaĵo Canuto, per kiu en 1965 ĉ. 250 personoj en landoj (unuavice afrikaj kaj aziaj), de kie ne eblas pagi kotizojn al Rotterdam, povis

iĝi aŭ resti individuaj membroj. Interalie la fondaĵo "Levi Lassen" en Nederlando jam donacis por tiu celo entute 1500,— gld.

Por Vastigo de la Agado

La monda kampanjo por kolektado de subskriboj por la Propono de UEA al Unuiĝintaj Nacioj ĝis nun progresis kontentige. Sed tiu tuta agado ne povis okazi sen gravaj kostoj: por presado kaj distribuado de subskribo-folioj, por administrado de la kampanjo, por cirkuleroj ktp. Pluajn elspezojn kaŭzos la transdono de la Propono en Nov-Jorko en oktobro, la reprezentiĝo tie kaj la akompanaj paŝoj: dokumenta informado al ŝtatoj-membroj de U.N., diskonigo de la okazaĵo tra la mondo, ktp. Ĉion ĉi UEA devas pagi, nome el la fondaĵo "Por Vastigo de la Agado (Jaro de Internacia Kunlaboro, Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto)".

Sed nun, jam en marto, tiu fondaĵo elĉerpiĝis. En la nuna stadio, kiam tiom da homoj jam kontribuis tiom da energio por atingi $\frac{3}{4}$ de miliono da subskriboj (vidu p. 93), ni nepre ne endanĝerigu la lastajn paŝojn per manko de rimedoj. La Estraro tial alvokas al ĉiuj membroj sendi ian kontribuadon, ĉu grandan aŭ malgrandan, por tiu esence grava fondaĵo.

Al Madrid en 1968!

Pri kongresoj la ĉefaj decidoj de la Estraro rilatis la programon de la 51-a U.K. en Budapeŝto kaj la elekton de kongresurbo por 1968. Por tiu jaro venis alloga invito el Madrid, kaj ĝin la Estraro akceptis.

Bone progresas la aliĝado al la U.K. en Budapeŝto, kiu jam superis 2200. La ĉefa laborotemo estos "Esperanto en la fakojn", dum ankaŭ pri informado okazos aparta kunveno. La Tria Internacia Arta Festivalo inkluzivos prezentojn de Internacia Arta Teatro, Bulgara Esperanto-Teatro kaj la Teatro Populara de Łódź. La Internacia Somera Universitato konsistos el 10 prelegoj pri lingvistikaj kaj artaj temoj de profesoroj el 9 landoj, i.a. el Ĉinujo, Hindujo kaj Japanujo.

La K.K.S. raportis pri sia vizito al Tel Aviv en marto, kiam li povis fari la unuajn aranĝojn por la U.K. 1967. Okazis tre sukcesa gazetara konferenco kun partopreno de enlandaj kaj eksterlandaj ĵurnalistoj. La urbaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj rilatas tre favore kaj helpe al la Kongreso.

Ankaŭ por la 2-a Internacia Lerneja Konferenco en Graz (sub aŭspicioj de UEA) la aranĝoj kaj aliĝado progresas kontentige.



Entute la perspektivoj por plua agado estas klaraj; tamen nur per sindona kaj solidara apogo de ĉiuj UEA povos pliproksimiĝi al siaj finaj celoj.

LA TURKA LINGVA REFORMO KAJ ĜIA SIGNIFO POR ESPERANTO



1928. Atatürk instruas la novan abocon en Sarayburnu, Istanbul. Per lia apogo la movado por reformo de la turka lingvo kaj adopto de fonetike taŭga alfabeto ricevis decidan impeton. En la apuda artikolo juna usonano instruanta en Turkujo komparas la situacion de la turka lingvo kun tiu de Esperanto.

esperanto
majo 1966

Unu el la plej fierendaj posedaĵoj de la Turkuja popolo estas ĝia lingvo. La turkoj rajtas pro du kialoj fieri. Unue, ilia lingvo depraĉe havas Esperantecajn simplecon kaj logikecon tute ne troveblajn ĉe la hindeŭropaj lingvoj. Tiun econ de la turka mi ne plu priskribos, ĉar ĝi tre similas al sia fratlingvo la uzbeka, prezentita en n-ro 720 de *Esperanto*. Due, mem savis la turkoj sian lingvon de preskaŭa perdiĝo.

Dum la Osmana Imperio la oficiala kaj literatura lingvo plenpleniĝis je arabaj kaj persaj vortoj. Oni tiom estimis la araban kaj persan kulturojn, ke ne nur vortoj sed eĉ tute malturkecaj gramatikeroj eniris la lingvon. Oni povis facile trovi longajn frazojn, kies unu-du afiksoj estis turkaj sed kies tutan ceteron konsistigis fremdaj radikoj kaj afiksoj. Krome, oni uzis la abocon araban, ĉe kiu mankis pluraj turklingvaj sonoj, kaj kiu estis tiel malfacila, ke nur eta ero de la popolo povis saviĝi de senaboceco. Ĉi ĉio forigis la belan regulecon de turkaj sonoj, vortoj kaj frazoj, tiom ke oni jam nomis la lingvon "la osmana" anstataŭ la turka. Tiel estiĝis granda lingva aparteco inter la altaj kaj malaltaj sociaj niveloj, ĉar la popolo ankoraŭ parolis lingvon preskaŭ pure turkan.

Barilo disrompita

Sed dum la finaj jardekoj de la dekoka jarcento komenciĝis movado por purturkigi kaj tiel popoligi la lingvon ŝtatan kaj verkan. Ekde la fondiĝo far Atatürk de la respubliko, tiu movado ricevas oficialan apogon. La streĉan historion pri tiu movado mi povas nur sumskribi ĉi tie. La turka gramatiko estas jam libera de fremdaj eroj. Ekde 1928 la lingvo skribiĝas per facila kaj fonema aboco latinbaza, lingvosciencie taŭgigita por la turka. Antaŭ 70 jaroj estinte nur 10- aŭ 15-centone turka, la vortaro uzata en ĵurnaloj nun estas 63-centone turka. Interalie, la scienca terminaro estas grandparte turkigita. En multaj libroj oni nun trovas, malkiel antaŭ duona jarcento, neniom da frazoj kun pli ol unu-du elfremdaj vortradikoj. Do la literaturo finfine verkiĝas per vortoj kompreneblaj al ĉiu, kaj presiĝas per literoj rapide lerneblaj por ĉiu. La lingva barilo kontraŭ amasa kleriĝo estas disrompita.

El la nun uzataj vortoj, iujn konservadis la ordinarularo dum la klerularo parolis osmane. Sed multajn aliajn la movadanoj mem ekestigis kunmetante laŭ dezirataj signifoj turkajn radikojn kaj afiksojn. Jen kelkaj ekzemploj:

Fremda vorto Nova aŭ retrovita turka vorto

kâtip (sekretario)	 yazman (skribisto)
fert (individuo)	 birey (unuopulo)
birader (frato)	 kardaş (samventrano)
tayyare (aeroplano)	 uçak (flugilo)
riyakâr (hipokrita)	 ikiyüzlü (duvizaĝa)
ma'lûmat (informo)	 bilgi (sciaĵo)
mesele (problemo)	 sorun (demandumo)
muhafazakâr (konservativa)	.. tutucu (tenista)

kabul etmek (akcepti) .. benimsemek (miaigi)
fakir (povra) yoksul (nenihava)
prensip (principo) ilke (unuao)

Kaj la movado daŭras plu. Kvankam komence oni sensuspekte akceptis tuteŭrope uzatajn greklatinajn vortojn, tamen ties multiĝo kaj la grandnombra enlingviĝo de francaj kaj anglaj vortoj ektimigis onin pri nova — okcidenta — malsimpliĝo de la lingvo kun rezulto ne pli bona ol la osmana. La nuna kampanjo celas malbonvenigi ankaŭ "mersi", "enformasyon", "restoran" kaj aliajn tiajn vortgastojn.

Ekde sia komenco, la movado renkontis naturistajn kontraŭstarantojn, kiuj kredis, ke lingvo estas netuŝebla sanktaĵo kaj priridis la "artefaritecon" de la novaj vortoj. Aliaj opiniis la lingvon ne esprimova kaj la esperon pri ĝia kultura moderniĝo vana. Ĉu tiajn argumentojn vi eble jam aŭdis? Jes, inter la esperantistaro kaj la parolantoj de la hodiaŭa turka estas pluraj komunaj spertoj, kaj pro tio komunaj ideoj. La esperantistaro konscie elektis Esperanton kiel vojon al certa celo; kaj la turkoj, konstatinte, ke lingvo estas fenomeno socia, intence kaj ĝisfunde aliigis la vortaron kaj skribmanieron de sia lingvo por atingi certajn rezultojn. Nun kaj la esperantistaro kaj la turkaro posedas lingvon belan kaj logikan, kiu rajtigas la uzantojn estigi novajn vortojn per jamaj vorteroj. Fine, unu el la plej valoraj utiloj de Esperanto estas tio, ke ĝi plurkiele povos protekti la memstaron kaj eĉ la ekziston de la naciaj lingvoj. La turkoj, fieraj pri siaj nacieco kaj lingvo, kredas ke "la nacia lingva afero estas problemo de nacia ekzisto kaj nacia defendiĝo." Ili devis ĝis nun protekti la lingvon de pluraj disvastiĝemaj hegemoni-

lingvoj — jen la persa, jen la araba, jen la franca, nun la angla, morgaŭ (laŭ pluraj turkoj) la germana.


Antaŭjuĝoj ne troviĝas

Do oni ne trovas ĉe la turkoj la romantikajn naturismajn antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto trovatajn alilande. Male, la komunaj spertoj kaj celoj inter la esperantistaro kaj la turka popolo, kaj ankaŭ la komunaj ecoj de la du lingvoj, estigas pri Esperanto grandan akceptemon en Turkujoj klerulaj rondoj. (Ekzemple, en la ĉi-janua numero de *Türk Dili*, la organo de la duon-oficiala Turka Lingva Asocio, kiu jam de 33 jaroj gvidas la purturkigo-movadon, aperis vigle favora artikolo finiĝanta per la jenaĵo: "Ni deziras ke la tre facile lernebla lingvo Esperanto atingu sian pacan celon kaj disvastiĝu en nia lando.") Aliflanke, substreken de estas, ke krom la utilo de Esperanto al Turkujo, ankaŭ la spertoj de la (ol ni pli sukcesinta) purturkigo-movado povas tre utili al la Esperantistaro. Movade, ni povas studi la metodojn de la Turka Lingva Asocio kaj lerni kiel tiu pritraktis problemojn similajn al la niaj. Lingve, ni povas atendi, ke en estontaj jaroj la turka esperantistaro, dum ĝi pliriĝigos nian tradukitan kaj originalan literaturon, samtempe faros valorajn aldonojn al la kunmetita vortaro de Esperanto, surbaze de siaj samkampaj spertoj kaj provoj pri la turka.

Jonathan Pool

(Dankon al la Turka Lingva Asocio kaj ĝia Ĝenerala Sekretario pro ilia malavara donaco de tempo kaj materialoj.)

En la Nacia Biblioteko en Ankara. La lingvaj reformoj de Atatürk malfermis novan pordegon al amasa kleriĝo.



esperanto
majo 1966



Hungaraj popolartaĵoj

artikolserio:

LA ETNAJ LINGVOJ EN KOMPARA KUN LA INTERNACIA

6: la hungara

La hungara lingvo, parolata de 13-14 milionoj da homoj, el kiuj 10 milionoj loĝas Hungarlande, estas senparenca inter la ĉirkaŭe parolataj lingvoj: nek ĝermana, nek slava, nek latinida. La hungaroj, klopodante trovi parencojn almenaŭ en la antikvo, laŭ saga-fragmentoj konservitaj de mezepokaj kronikoj, rigardis sin posteuloj de la hunoj, kies reĝo Attila, la "skurĝo de Dio", havis iam sian restadejon sur la hungara Ebenajo. Spuro de ĉi tiu kredo estas, ke Attila ĝis nun estas ofta baptonomo hungara, kaj oni faris eĉ ĝian virinan varianton Etelka. Sed troviĝis grandscienca kaj grandfantazia historiisto, al kiu la hunoj ne estis sufiĉe praaj: li malkovris per kurioze sprita etimologumado, ke prapatro de la hungaroj estis Nimrod, "potenca ĉasisto antaŭ la Eternulo" (Genezo, 10, 9), ke hungaroj estis la ŝumeroj kaj ke ankaŭ Adamo kaj Eva parolis hungare en la paradizo.

Kiam antaŭ ĉ. 200 jaroj multescia hungara monako malkovris, ke la hungara lingvo havas similecon kun la lapona, la fiera nobela nacio ne tro entuziasmis pri la "fiŝodora parenceco". Nu, de tiam la lingvistoj nedubeble pruvis, ke la hungara lingvo apartenas al la finnougraj

K. Kalocsay

LA

lingvoj, do parenkas al la estona kaj finna, plej proksime parenca ĝi estas tamen ne al ĉi tiuj, sed al la Ob-ugraj lingvoj: la ĥantia (ostjaka) kaj la manjŝia (vogula).

Nomadoj inter Don kaj Dnepro


La lingvistoj, per la esploro de la lingvokonsisto, povis eĉ rekonstrui la prahistorion de la hungaroj. Ekzistis iam komuna finnougara popolo ie oriente de la kubuto de Volgo cis kaj trans Uralo; ĉi tio estis ĉ. 2000 a. K. Tiu popolo disvastiĝante disdialektiĝis: plej oriente loĝis la Ob-ugroj, plej okcidente la permlingvanoj (komioj, mordvinoj); poste el ĉi lasta grupo eliĝis la finnoj kaj estonoj. La prahungaroj loĝis meze de la Ob-ugroj kaj komioj. Proksimume inter 1000 kaj 500 a. K. la prahungararo forŝiriĝis de la Ob-ugroj, verŝajne pro la interkoniĝo de gento, premanta la Ob-ugrojn norde, la hungarojn suden. La hungaroj, el la arbara medio, venis sur herbajn stepojn, kontaktiĝis, parte eĉ kunfandiĝis kun ĉuvaŝ-turkaj kaj bulgar-turkaj triboj (onoguroj, sabiroj, kabaroj), pli kaj pli transprenis ties vivmanieron kaj ankaŭ multajn vortojn apartenajn al tiu nova vivo. En la historio ili aperas jam kiel nomada rajdanta popolo, vivanta, en la 9-a jarcento p. K., inter Don kaj Dnepro, borde de la Azova Maro; ĝis tiam ili akceptis en sian lingvon ankaŭ alanajn (osetajn), iranajn kaj rusajn elementojn. Sed en tiu loko ili estis elmetitaj al la senĉesaj atakoj de la peĉenegoj, do, serĉante por si pli sekuran lokon, ili transloĝiĝis unue en la regionon "Etelkuzu", inter Dnepro kaj Sereto, poste, en 895 trans la Karpatojn, en la hungaran Ebenajon kaj Panonion.

En la nova patrujo hungaroj trovis diverslingvan loĝantaron, precipe slavojn (slovenojn, slovakojn), sed ankaŭ bulgarojn parolantajn ankoraŭ turklingve kaj restaĵojn de avaroj. Multloke estiĝis regionoj de miksa loĝantaro kaj tio lasis siajn spurojn en la lingvo. Post la alprenado de la kristaneco, ekde 1000 sekvis influo germana, slava, itala, ĉar la misiistoj estis fremdaj pastroj. La germana influo plifortiĝis per la disvastiĝo de la reformacio kaj poste per la regado de la Habsburgoj. Novaj italaj elementoj penetris en la lingvon en la tempo de la Anjou-aj reĝoj (14-a jarcento). La eklezio, juro, scienco alportis vortojn el la latina. Relative malmulta estis la turka influo dum la 150-jara turka regado.

Lingvo-novigo

Malgraŭ ĉi tiuj multaj kaj multspecaj influoj, la hungara lingvo tamen konservis sian originan ugran karakteron, ne nur en la lingvostrukturo, sed ankaŭ koncerne la sufiksaron

en la ina genro). Notinde estas, ke tiun akuza-
tigon la lingvo ne heredis de la praugra, sed
mem evoluigis, kaj ĝia uzado, komence ŝan-
celiĝema, grade firmiĝis ĝis la nuna reguleco.



kaj la trunkon de la lingvostoko. Kvankam
la origine ugraj vortradikoj ne estas pli ol
1000, per la sufiksoj estas derivitaj el ili pluraj
dekmiloj. Multe faris ĉi-koncerne la lingvo-
novigo en la pasinta jarcento: plejparte el
ugraj elementoj ĝi derivis vortojn por la
esprimo de plej diversaj nocioj ĝis tiam espi-
mataj per amase enhejmiĝintaj, precipe latin-
devenaj vortoj. La radiko *áll* (star-) ekz-e
havas pli ol 50 derivaĵojn, la radiko *el* (antaŭ-)
preskaŭ 50. Tiel estas kompreneble, ke malgraŭ
la multaj "pruntvortoj", en la nuntempa
beletro ekz-e 70-80% de la vortoj estas ugro-
devenaj.

Nun ni rigardu, per kio diferencas la hungara
lingvo de la hindoeŭropaj lingvoj.

1. La hungara ne havas gramatikajn gen-
rojn. Ne nur ĉiuj substantivoj estas neŭtraj,
sed ankaŭ la triapersona pronomo (ő). En la
tempo de la lingvonovigo oni eksperimentis
per virina personpronomo (őné), sed la lingvo
ne akceptis la neologismon.

2. La hungara uzas la akuzativon pli regule
kaj konsekvence ol iu ajn hindoeŭropa lingvo
(la latinidaj lingvoj kaj la angla ĝin perdis, la
germana ĝin havas nur en la vira, la rusa nur

3. La lingvo ne havas genitivon (posedan
kazon): la posedrilaton ĝi esprimas per nomi-
nativo aŭ dativo de la posedanto kaj per
posedaĵ-finaĵo de la posedato. Ekz-e: *az em-
bernek a háza* = al la homo la domo-lia; aŭ
simple: *az ember háza* = la homo domo-lia.


4. La lingvo ne havas prepoziciojn: la ad-
jektojn ĝi esprimas parte per sufiksoj deve-
nintaj el adverboj, parte per postpozicioj.
Ekz-e: *ház* = domo:

<i>házban</i> (en)	<i>házba</i> (en-n)	<i>házból</i> (el)
<i>házon</i> (sur)	<i>házra</i> (sur-n)	<i>háztól</i> (de sur)
<i>háznál</i> (ĉe)	<i>házhoz</i> (ĉe-n)	<i>háztól</i> (de ĉe)
<i>ház előtt</i> (antaŭ)	<i>ház elé</i> (antaŭ-n)	<i>ház elöl</i> (de antaŭ)
<i>ház mögött</i> (post)	<i>ház mögé</i> (post-n)	<i>ház mögül</i> (el post)

5. Anstataŭ personpronomaj adjektivoj (mia,
via ktp.) la lingvo uzas posedan deklinacion:

<i>házam</i>	<i>házad</i>	<i>háza</i>
(mia domo)	(via domo)	(lia domo)
<i>házunk</i> *	<i>házatok</i>	<i>házuk</i>
(nia domo)	(via domo)	(ilia domo)
kies pluralo estas		
<i>házaim</i>	<i>házaid</i>	<i>házai</i>
(miaj domoj)	(viaj domoj)	(liaj domoj)
<i>házaink</i>	<i>házaitok</i>	<i>házaik</i> *
(niaj domoj)	(viaj domoj)	(iliaj domoj)

Kecskemét, Hungarujo: la konsilejo de la urbodomo





la hungara lingvo (daŭrigo)

6. En la konjugacio, la verbo havas personindikajn finaĵojn; la personpronomoj uziĝas nur se ili estas akcentataj. Specialaĵo de la hungara lingvo estas, ke ĝi havas du konjugaciojn: subjektan kaj objektan; la objektaj konjugaciaj formoj entenas ankaŭ la personpronoman objekton: *látok* (mi vidas), *látlak* (mi vidas vin), *látom* (mi vidas lin aŭ ĝin); krome ĝi estas deviga, se en la frazo troviĝas difinita objekto: *látok egy házat* (mi vidas domon), *látom a házat* (mi vidas la domon). La du (aŭ tri) konjugacioj estas distingitaj en ĉiu tempo kaj modo; mi montru nur la prezencon de la verbo *látni* (vidi):

Subjekta: *látok, látsz, lát; látunk, láttok, látnak*.
Objekta: *látom, látod, látja; látjuk, látjátok, látják*.

El la finnougraj lingvoj tia objekta konjugacio ekzistas nur en la ĥantia, manĵsia kaj komia lingvoj.

7. La adjektivo staranta antaŭ la epitetita substantivo ne akordiĝas: *nagy ház* (granda domo), *nagy házak* (grandaj domoj), *nagy házakat* (grandajn domojn); sed postmetite, ĝi akordiĝas: *látok házakat, kicsiket és nagyokat* (mi vidas domojn etajn kaj grandajn). Do ĝuste inverse, ol en la germana.

8. La helpverbo "estas" ne estas uzata ĉe predikativo, se la subjekto estas triapersona: *fiam boldog* (mia filo estas feliĉa), *fiaim boldogok* (miaj filoj estas feliĉaj). Kiel oni vidas, la predikativo akordiĝas nombre.

9. La konjugacio iam estis multe pli formriĉa; jen ĝiaj formoj iamaj (ligita per streketo estas la objekta konjugacia formo): prezenco: *lát-látja* (li vidas), imperfekto: *lát vala-látja vala* (estis vidanta), aoristo: *láta-látá* (vidis), perfekto: *lá-*

Popolkostumaj pupoj

tott-látta, pluskvamperfekto: *látott vala-látta vala* (estis vidinta), futuro: *látand-látandja* (vidos). El ĉiuj ĉi restis en la hodiaŭa lingvo nur la prezenco kaj la perfekto (*lát-látja* kaj *látott-látta*). El la ceteraj laste pereis la aoristo; ĉe Petöfi kaj Jókai ĝi ankoraŭ estas ofte trovebla. La futuro oni nun esprimas plejparte per prezenco, vidos). Sed ĉar la perfektion oni esprimas regule per perfektiv-prefiksoj, la iama perfekto transprenis la funkcion de la imperfekto: *irta a levelet* (estis skribanta la leteron), *megirta al levelet* (pretskribis la leteron). Kaj konservis la lingvo multajn momentaspektajn kaj komencaspektajn verbojn, precipe ĉe la mov- kaj son-verboj, kiuj ofte estas onomatopeaj: *csorog* (= ĉorog: verŝiĝas), *csorran* (certa kvanto subite verŝiĝas), *csordul* (ekverŝiĝas), *csordogál* (verŝiĝadas); *dörög* (tondras), *dörren* (subite ektondras por momento), *dördül* (ektondras); *csobog* (= ĉobog: plaŭdas), *csobban* (ekplaŭdas) ktp.

10. Oni parolas ĝenerale pri la *aglutina* karaktero de la hungara lingvo kaj tio estas ankaŭ ĝusta tiom, ke ofte, eĉ plej ofte, la vortelemantoj intergluiĝas senŝanĝe: *boldog* (feliĉa), *boldogtalan* (malfeliĉa = feliĉosena), *boldogtalanság* (malfeliĉo), *boldogtalansága* (lia malfeliĉo), *boldogtalanságában* (en lia malfeliĉo). Tamen, tiu senŝanĝeco ne estas absoluta: okazas konsonantperdiĝoj el eŭfoniaj kaŭzoj: *emleget* (anst. említget: menciadas), *šántikál* (anst. šántitkál: lamadas); kaj ankaŭ t.n. konsonant-asimilo: *bottal* (anst. botval: per bastono), *házzal* (anst. házval: kun domo) ktp. E. N. Setälä eĉ malkovris, ke la finnougri pralingvo estis fleksia kaj ke spuroj de tio restis kaj en la finna kaj en la hungara lingvo. Eble kun ĉi tio interrilatas tiuj verboparoj, kies senco ŝanĝiĝas laŭ vokalsanĝiĝo: *kever* (kirlas, ekz-e supon per kulero), *kavar* (kirlas, ekz-e vento foliaĵon); *gyür* (= djür: ĉifas), *gyur* (= djur: knedas), *tipeg* (paŝetas, infaneto), *topog* (samloke paŝetadas senpacience).

11. Jam sub la punkto 9 oni povis vidi la onomatopean karakteron de pluraj vortoj. La lingvo estas tre riĉa je tiaj vortoj kaj ricevas de ili, se tiel diri, "sonpitoreskecon". Mi citas nur vortojn komenciĝantajn per *su* (legu: ŝu): *súg* (flustras), *súg-búg* (sekrete interflustradas), *suhan* (apenaŭ aŭdeble preterpasas rapide), *suhog* (susuras kiel silko, svingata bastono), *susog* (susuras kiel frondo), *suŝtorog* (susuras kiel malseka ligno brulanta), *surrán* (subite sekrete iras ien), *suttog* (flustras).

12. Tiun pitoreskecon pliigas ankoraŭ la multaj tiel nomataj ĝemelvortoj; interligitaj vortoparoj. Ili povas konsisti el du similencaj vortoj: *csúszó-mászó* (ĉuusoo-maasoo: rampant-grimpanta), *szánja-bánja* (saanja-baanja: pentas-bedaŭras), *sebbel-lobbal* (rapide-akute),

aŭ el sencohava vorto, kiun antaŭas ĝia altvokala varianto memstare sensenca: *lim-lom* ("fitriso"-fatraso), *girbe-gurba* ("kirba"-kurba), *nyifeg-nyafog* ("limentetas"-lamentetas), aŭ el sencohava unua vorto kaj per deformita dua: *ingó-bingó* (ŝanceliĝema), *tarka-barka* (strange bunta), *csiga-biga* (heliketo).

13. Specialaĵo de la lingvo estas la t.n. vokalharmonio aŭ vokalkonformiĝo. Tio signifas, ke altaj vokaloj (e, ö, ü) ĝenerale ne miksiĝas kun malaltaj (a, o, u) en la sama vorto. La lingvo transformis laŭ ĉi tio ankaŭ multajn alprenitajn vortojn; tiel el la germanaj *Zucker* kaj *Herzog* ĝi formis *cukor* (sukero) kaj *herceg* (princo). Pro ĉi tiu principo, la diversaj sufiksoj havas apartan formon por la altvokalaj kaj apartan por la malaltvokalaj vortoj: *házban* (en domo), sed *kertben* (en ĝardeno); *házról*, sed *kertről* (de, pri); *szépség* (seepŝeeg: beleco), sed *rútság* (ruutŝaag: malbeleco).

14. Mi menciu ankoraŭ du apartaĵojn. La unu estas, ke post numeraloj sekvas singulara substantivo: *egy ház* (unu domo), *tíz ház* (dek domoj), *sok ház* (multaj domoj). La alia estas, ke la familia nomo antaŭas la individuan: *Julio Baghy* hungare estas *Baghy Gyula*.

15. La akcento estas ĉiam sur la unua silabo. Vokalojn havas la lingvo, krom la E-aj, ankaŭ ö kaj ü; ĉiu vokalo havas longan kaj mallongan variantojn. La vokallongeco estas tute sendependa de la akcentado; jen kial la lingvo estas taŭga je la uzo de la klasika, tempomezura metriko. Krom la E-aj konsonantoj ekzistas ankaŭ la molaj *gy* (dj), *ny* (nj) kaj *ty* (tj).




Jen do, en 15 punktoj, skizo pri la ecoj de la hungara lingvo. Pri la valoro de la lingvo estas malfacile fari ian takson: sur tia kultura grado, kian la hungara lingvo atingis, ĉiuj lingvoj estas samrangaj, sen konsidero pri ilia diverseco en ĉi tiu aŭ tiu rilato. Se tamen diri ion ĉi-koncerne, laŭeble tute sen porinfluiteco, malforta flanko de la lingvo estas la danĝero de monotoneco sekve de la vokalkonformiĝo, precipe pro la amasiĝo de "e"-vokaloj en kelkaj vortoj: *lehetetlen* (malebla), *nevezetes* (notinda); krome la finaĵoj de la pluralo (k) kaj de la akuzativo (t) povas ŝajni seksonaj

— sed ili estas ekvilibrataj per la multaj molaj sonoj (j, dj, nj, tj); cetere la lingvo estas agrable vokalriĉa, tre klara por la aŭdo. Fortaj flankoj estas la strikta logika interligo de la vortoj en la frazo per morfemoj kaj dank' al tio la granda klareco de esprimo, krome la granda koncizo (Shakespeare, ekz-e, povas esti tradukebla verso po verso), la kapablo derivi novajn vortojn por novaj nocioj per sufiksoj (en la tridekaj jaroj oni hungarigis ĉiujn sportajn terminojn, kaj tiuj nun estas ĝenerale uzataj anstataŭ la fremdoriginaj). Ekstreme elasta estas la hungara vortordo: ĝi ebligas esprimi tre delikatajn nuancojn sencajn kaj sentajn.

Certe, en la lingvo de tiu malnova, piedira, ĉasanta-fiŝkaptanta genteto devis esti ne malgranda forto de vivo, se tra tiom da migradoj kaj peripetioj, influate de tiom da kontaktiĝantaj aŭ enfandiĝantaj fremdaj gentoj, ĝi povis tamen konservi sian strukturon, konformiĝi al la sangiĝantaj bezonoj, kaj evoluigi eĉ tiel riĉan literaturon, precipe poezian, kaj tiel ampleksan, oni povus diri, ĉioalproprigan tradukliteraturon, kiuj tute ne estas proporciaj al la nombro de ĝiaj parolantoj.

'La vazo-dekoracia arto de Hungarujo havas longan tradicion kaj unikan stilon.



GLOSOJ

cis: maltrans

adjekto: cirkonstanca komplemento de verbo

perfektivo: rezultnaska verbo

eŭfonio: bonsoneco

fatraso: aĉaĵ(ar)o

peripetio: aventura sortoturno precipe malfavora

aoristo: rakonta verbotempo

En la lasta tempo aktualiĝis la uzo de elektronaj kalkulmaŝinoj (komputiloj) por komposti gazetojn kaj librojn. Kelkaj germanaj kompostejoj sekvis la usonan ekzemplon kaj instalas IBM-maŝinojn por tiu celo; pli ol deko en Germanujo mendis ilin por livero dum 1966.

La aŭtomata kompostado signifas permaŝinan traktadon de la teksto, kaj tial tio interesas la lingviston. Kune kun dokumentado kaj lingvotraduko ĝi apartenas al tiu moderna apliko de elektronaj komputiloj, kiun oni nomas "nenumera informtraktado", en kiu ĝi estas unu el la pli simplaj aplikoj.

Taskoj de la kompostisto

Por kompreni la problemon, ni prezentu al ni la laboron de la maŝinkompostisto. Li devas 1-e kopii tajpe la tekston, 2-e zorgi por tio, ke la linio enhavu laŭeble plej multajn vortojn, sed neniam tro multajn (por la plilarĝigo de la interspacoj tiel, ke fariĝas glata dekstra margeno, la maŝino zorgas mem), 3-e dividi korekte la silabojn de la lasta vorto, se necese. Krome li devas 4-e atenti la enŝovon ĉe komenco de alineo, la mezŝovon de akcentitaj partoj, la mallongigon de linioj apud bildoj k.a. Por ke la kompostmaŝino ne estu dependa de la homa tajprapideco, kelkaj personoj samtempe tajpas ĉiujn informojn sur truita paperstrio (trustrio), kiun la kompostilo poste legas kaj kompostas je sia plena rapideco.

Pro la malegala larĝeco de presliteroj oni ne antaŭe scias, kiom da ili havas lokon en unu linio. Tial estiĝas maleblaj linioj, kiujn oni devas poste rekomposti. Kiamaniere nun helpas la elektrona komputilo en tiu laboro?

La 1-a paŝo, tajpado de la teksto en trustriojn, restos la sama. Tamen ne necesas atenti la larĝecon de linioj; oni tajpas seninterrompan ĉenon de la vortoj ĝis la fino de la artikolo. Tio jam ŝparas multan tempon.

2-e, la atento pri la fino de la linio estas tasko de la komputilo. Ĝi entenas tabelon de la larĝeco de ĉiu litero kaj adicias ĝin. Ĉe ĉiu vortinterspaco la maŝino kontrolas, ĉu la linio estas plena, kaj nun truiĝas kopistrio, kiu krome entenas la liniinformon por la kompostmaŝino.

3-e, se la lasta vorto troplenigas la linion, ekagas la programo de la silabdivido. Tio estas la plej problema kaj por ni plej interesa parto de la procedo. Antaŭ jaroj oni provis starigi kompletan vortaron kun ĉiuj dividebloj, kiun la maŝino devus memori. Ĉar necesas pli ol 100 000 vortoj, tiu procedo necesigis tre multekostajn maŝinojn, kiuj krome laboris malrapide. Alia eblo estis la rigida apliko de la regulo, ke oni dividu post la literoj 3 kaj 5 kaj 7, kun nur kelkaj esceptaj reguloj. Tio eble taŭgas por la angla lingvo, sed por aliaj, precipe la germana lingvo kun ĝiaj multtradikaj vortoj, ĝi tute ne estas aplikebla.

La nuna procedo tial baziĝas je tio, ke oni trastudis la regulojn de la silabdivido kaj transformis ilin en sistemon de 750 maŝininstrukcioj, kiuj nur okupas 5500 memorpoziciojn en la komputilo IBM 1440. Krome ĝi tamen uzas eksteran (pli malrapidan) diskmemoron kun certa nombro da esceptreguloj. La rezulto estas, ke la programo korekte dividas en 97 - 98 % de la kazoj. Konsiderante, ke divido nur aperas en triono de la linioj, oni devas postkorekti nur proks. du el 100 linioj pro malĝusta silabdivido, kion oni jam akceptas. Centprocentan aŭtomatan dividon oni ne povas atendi en la germana lingvo pro la homografoj, ekz. "Bein-haltung", "Be-inhaltung", kaj pro kelkaj nevenkeblaj malfacilaĵoj en kunmetaĵoj, kiel ekz. "Stabschef". Tiaj aperas tro malofte en tiu lingvo, por ke ili povu esti katalogitaj en la maŝinprogramo, kiu cetere memkompreneble entenas kutimajn vortojn de tiu speco kiel "Diens-tag", "Rat-haus".

Krom la gramatikaj leĝoj la programo ankaŭ atentigas la regulojn de la kompostistoj, kiuj konsideras kelkajn dividojn kiel malbelajn, ekz. "Wo-che", "Kir-che", "ih-ren".

Multe pli facila estas 4-e la atento de la reguloj pri enŝovo, mezŝovo aŭ pri la intermeto de libera linio post alineo. Tiaj reguloj fariĝas tre simplaj programinstrukcioj. Eĉ post la truigo de la paperstrio oni povas, per premo de butono, ŝanĝi la deziratan manieron. Sen kalkulmaŝino tia ŝanĝo signifus kompletan rekomencon de la laboro.

Kvankam tio jam konsiderinde plirapidigas la laboron de kompostejo, la elektroniko prezentas plurajn avantaĝojn. Ĉar la programo jam povas, en kazo de libro, kalkuli la pleniĝon de la paĝo, komposti la paĝnumeron kaj tiel prepari la paĝigon. Aparte valora tio estas en adreslibroj, kie la unua linio de ĉiu kolono ripetas la familinomon, dum la postaj nur enhavas strekon, ĝis ĝi ŝanĝiĝas. Permane tio signifas rekompostadon de ĉiuj komenclinioj post la paĝigo.

Ne konservi kompostaĵojn

La strion oni tiam konservas por la posta jaro anstataŭ la metalkompostaĵoj; la eldonejo nur truigas la ŝanĝitajn adresojn, kaj la komputilo aŭtomate anstataŭigas ilin en la ĝusta loko.

Konservi porelektronajn paperstriojn anstataŭ la metallinioj ankaŭ estas avantaĝo por klasikaj aŭ sciencaj verkoj kun oftaj novel-donoj: ĉe reaperoj oni povas ŝanĝi la larĝecon de la linioj, la manieron de enŝovo ĉe alineoj ktp. sen nova permana kompostado. Ekzemple artikolserio el gazeto en mallarĝaj kolonoj fariĝas tiel libro. Por pli longtempa konservo

(daŭrigo dekstre)

1. "En la ---a lingvo oni diras tiel kaj tiel. Certe tion oni ne povus esprimi en Esperanto."

Verŝajne ĉiuj popoloj estas fieraj pri sia propra lingvo. Prave: ĉar sur ĝi baziĝas multo el la kulturo de la popoloj. Ĉe ŝovinistoj tiu fiero pri la lingvo nuanciĝas per malestimo al aliaj lingvoj. Kaj ofte okazas, ke tiaj homoj, kiam temas pri la Internacia Lingvo, provas "pruvi" ĝian malsuperecon, citante vortojn aŭ frazojn, kiuj en ilia gepatra lingvo ŝajnas ege koncizaj, elegantaj aŭ esprimopovaj. Eĉ nesciante Esperanton, ili konjektas, ke la samon oni ne povas esprimi en Esperanto kun egala koncizo, eleganteco aŭ kun tiom da kromnuancoj... kaj ofte ili pravas.

Traduko plilongigas

La eraro en tia "pruvo", kompreneble, troviĝas en ĝia unuflankeco. Ĝi ja celas kompari Esperanton kun la koncerna nacia lingvo nur sur bazo de traduko el tiu lasta. Sed tradukado ja estas du-direkta afero. Tradukante el nacia lingvo en la Internacian, oni kutime trovas, ke la Esperanta teksto fariĝas pli longa. Ĉu tio pruvas, ke Esperanto estas malpli konciza lingvo? Ja ne: prenu nun originalan tekston en Esperanto kaj traduku ĝin en tiun saman nacia lingvon. Plej ofte montriĝos, ke en tiu okazo la nacilingva teksto fariĝas la pli longa. Nome, la klopodado por proksimiĝi al la originala signifo kutime mem kaŭzas, ke la traduko fariĝas pli ampleksa, sendepende de la lingvo.

Same, kiam oni komparas du lingvojn el vidpunkto de esprimkapablo aŭ eleganteco. Se

en lingvo A troviĝas nombro da vortoj kaj esprimoj malfacile tradukeblaj en lingvon B, certe ankaŭ tiu lasta posedas siajn proprajn apartaĵojn, esprimeblajn en lingvo A nur per ĉirkaŭfrazoj aŭ proksimumaĵoj.

Ĉiu lingvo havas avantaĝojn

Esperanto ne estas escepto. Iujn aferojn ĝi esprimas kun unika koncizo kaj trafeco; en aliaj kazoj, kontraŭe, ĝi bezonas multajn vortojn aŭ longan kunmetaĵon por redoni iun simplan esprimon el tiu aŭ alia nacia lingvo. Ĉiu lingvo ja havas sian propran karakteron, siajn proprajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

Evidente, kiam temas pri reguleco (kaj do facila lernebleco), Esperanto superas verŝajne ĉiujn aliajn parolatajn lingvojn de la mondo. Sed se temas pri esprimkapablo, ne estas kaŭzo por supozi, ke ĝi estas iel supera aŭ malsupera al aliaj lingvoj. Tial oni ne cedu al ŝovinismaj pretendoj pri la supereco de iu nacia lingvo, sed samtempe oni zorge evitu rebati per ia propra "internacia ŝovinismo". Prefere oni trankvile konsentu, ke kelkaj nacilingvaj esprimoj estas nur malfacile tradukeblaj en Esperanton, sed tuj aldonu kelkajn ekzemplojn de la malo. Preleganto pri Esperanto devus teni en memoro kelkajn trafajn ekzemplojn. (Se temas pri la angla lingvo, ekzemple, oni kontrastu *agaci* kun "to set someone's teeth on edge", *pilgrimi* kun "to go on a pilgrimage", *samrasano* kun "a member of the same race", ktp.) Fine oni klare komprenigu, ke normale oni ja ne tradukas, sed, pensante rekte en Esperanto, oni aŭtomate elektas ĉiam la plej oportunajn esprimojn, senkonsidere, ĉu ili havas iajn ekvivalentojn en nacia lingvo.

Bezono kreas esprimojn

Estas ĝenerala leĝo, ke la lingvoj daŭre adaptiĝas al la celoj, por kiuj oni uzas ilin. Kaj ju pli ofte oni uzas difinitan lingvon en difinita situacio, des pli riĉa ĝi fariĝas per vortoj konformaj al tiu situacio. En la artikolo de prof. Capell en la februara "Esperanto" li klarigis, kiel dense la aŭstroneziaj lingvoj de Pacifiko esprimas ideojn pri la posedo de kokosoj. Same tiel, la angloj, kiuj ofte manĝas rostitan panon, nomas ĝin per aparta vorto (*toast*), dum aziaj popoloj, kiuj plej ofte manĝas kuiritan rizon, nomas ĝin per aparta vorto, distinge de la nekuirita. (Kelkaj uzas en Esperanto la vortojn *toast* kaj *fano* por tiuj du konceptoj.) Simile, la antaŭeco de Sovetunio kaj Usono sur la kampo de kosmaj esploroj neeviteble kaŭzis, ke la lingvoj rusa kaj angla riĉiĝis per kosmonaŭtikaj esprimoj, kiujn en aliaj lingvoj oni malpli glate povas trovi. Kaj Esperanto? Nu, en kiu alia lingvo oni povas esprimi tiel koncize la koncepton *krokodili*?
V.S.

(daŭrigo de maldekstre)

— ekz. por eldono de verkaro de klasikulo — pli ol paperstrio la elektrona magnetbendo taŭgas. Unu bobeno povas enteni la informojn de 4000 paĝoj po 2500 literoj.

La enhavo de la paperstrio aŭ magnetbendo povas esti presita per elektrona rapidpresilo. La aŭtoro tiel ricevas kontrolpresafon por korekti jam en definitiva formo, antaŭ ol la teksto estas metale kompostita. La kopio jam havas paĝnumerojn kaj povas servi por la kompilado de la indekso. En kazo, ke la paĝnombrado ŝanĝiĝos pro interŝoj, la komputilo eĉ aŭtomate ĝisdatigas la indekson.

Ĉiuj ĉi avantaĝoj estas tiel okulfrapaj, ke kredeble baldaŭ elektronkomputilo apartenos al la normalinstalaĵo de ĉiu iel pli granda eldonejo aŭ kompostejo. La samaj maŝinoj povos tiam esti vaste uzataj por eksperimentoj de pli komplika lingvoprocedo.

(El "Interlingvistika Informa Servo")

esperanto
majo 1966



Pri Natume sooseki (1867-1916), unu el la gigantoj de la japana literaturo, skribis Miyamoto masao en la enkonduko de "El Japana Literaturo" ĵus aperinta: "Nur bedaŭrinde estas ke li ne verkis mallongan rakonton por ke oni metu en tiaspecan kolekton, krom kelkaj skizoj, kia 'La turo de Londono'. Ankaŭ estas notinde ke li sukcesis eduki siajn disĉiplojn tiel majstre ke la pliposta generacio estis reprezentata de ĉi tiuj, kun Akutagawa ryunosuke (1892-1927) kiel la unua."

La ĉi tie represitaj pecoj el "Songoj en dek noktoj" unue aperis en Esperanta traduko de Eskulapida Klubo (Tokio) sur "La revuo orienta" en 1940. Kvankam eble neadekvataj por prezenti la aŭtoron, kies ĉefa verkado estis romana, ili tamen servu por atentigi pri li kaj pri lia graveco.

La tuta serio da "Songoj" kaptas kun eksterordinara viveco la koheran-nekoheran, racie frenezan kvaliton de songoj mem spertitaj. En ambaŭ elektitaj pecoj sentiĝas, malgraŭ la humuro de la dua, ia persekuta premo. En la unua temas evidente pri la premo de subkonsciaj riproĉoj – el antaŭa enkarniĝo? – pene repuŝataj. Certe ambaŭ pecoj rekompencas refojan trailegon.

Kiel aparta eldonajo aperis de la sama aŭtoro la jam menciita "Turo de Londono" (mendebla ĉe UEA), kiu jam atingis sian trian Esperantan eldonon.

La tria nokto

Jenan songon mi songis.

Sesjaran infanon mi portas sur mia dorso. Ĝi estas certe mia fileto, kvankam mi, strange por diri, tute ne scias, ke ĝi fariĝis blukapulo perdinte sian vidkapablon. "Kiam vi blindiĝis?" mi do demandas ĝin. "Jam de tre longe", ĝi respondas. Ĝia voĉo estas sendube tiu de infano, sed ĝia parolmaniero, komplete tiu de plenaĝulo. Krome ĝi parolas maldece, egale kiel mi.

Dekstre kaj maldekstre etendiĝas verdaj rizkampoj. Voĵeto estas malvasta. De tempo al tempo ombrosimile traflugas ardeoj en la mal-lumo.

"Inter rizkampojn ni nun enpaŝas?" aŭdiĝas voĉo sur mia dorso.

"Kial vi scias tion?" returnante mian vizaĝon mi demandas.

"Ĉar ardeo krias. Ĉu vi ne aŭdas ĝin?" ĝi respondas.

Kaj ĝuste tiam ardeo efektive krias du aŭ tri fojojn.

Mi iom ektimas pro la infano, kvankam ĝi estas certe mia fileto. Kio al mi okazos de nun, portante tian ulon? Mi do rigardas for antaŭen, serĉante lokon por forlasi ĝin, kaj jen mi povas distingi grandan arbaron en la mallumo. "Tie," mi ekpensas kaj ĝuste tiam aŭdiĝas mokrido "Hu-hum!" sur mia dorso.

EL "SONĜOJ EN

"Pro kio vi rikanas?"

La infano ne respondas, sed nur demandas:

"Paĉjo, ĉu vi sentas min peza?"

"Ne peze," mi respondas.

"Baldaŭ mi fariĝos peza," ĝi diras.

Silente mi nun paŝadas celante la arbaron.

La vojo inter la rizkampoj neregule serpentumas kaj nin kondukas nur malfacile. La voĵeto baldaŭ duiĝas antaŭ ni, kie mi haltas por iom ripozi.

"Ŝtono devas stari tie," diras nun la bubeto.

Kaj efektive staras ŝtono dika je ĉirkaŭ ok coloj kaj alta je mia talio. Sur ĝia antaŭa supraĵo estas skribita: "Dekstren: al Hattabara. Maldekstren: al Higakubo." Malgraŭ la mal-lumo la ruĝaj literoj estas klare legeblaj; ili montras ruĝan koloron similan al la ventro de japana trito.

"Maldekstren ni iru!" ordonas la bubeto. Tie la arbaro ĵetas de la ĉielo sian ombran figuron sur niajn kapojn. Kelkan tempon mi hezitas.

"Ne hezitu!" denove diras la bubeto. Mi do vole-nevole ekpaŝas al la arbaro. Pensante en la koro, kial ĝi, kvankam blinda, ĉion mirinde scias, mi alproksimiĝis rekte al la arbaro. "Estas maloportune esti blinda!" aŭdiĝas voĉo sur mia dorso.

"Mi tial portas vin sur mia dorso."

"Mi vere dankas vin por via penado. Sed, estas ne agrable, esti ĉiam malrespektata de ĉiuj. Eĉ la patro min malrespektas!"

Mi fariĝas nedifineble maltrankvila. Mi do rapidas, por ke mi povu plej frue atingi la arbaron kaj forlasi ĝin tie.

"Kiam vi iros plue, vi komprenos ĉion! — Estis ĝuste tia vespero!" ĝi kvazaŭ al si mem diras sur mia dorso.

"Kio?" konfuzite mi demandas.

"Kio?" la knabeto moke ripetas, "vi ja bone tion scias!" Tiun momenton mi eksentas kvazaŭ mi jam scius tion. "Jes, en tia vespero tio okazis," mi sentas nur ne klare. "Jes, kiam mi iros plue, mi povos sciigi tion", mi sentas. "Kaj se mi tion komprenos, io devas okazi. Mi devas trankviliĝi, forlasinte ĝin antaŭ ol mi tion komprenas." Tiel mi pensas. Mi pli kaj pli rapidas.

Pluvas jam de longe. Malheliĝas pli kaj pli sur la voĵeto. Mi estas kvazaŭ en deliro. Nur malgranda bubeto, algluanta sin al mia dorso, brilas kvazaŭ spegulo, kiu spegulas mian tutan estinton, estanton, estonton kaj nenion restigas. Malgraŭe ĝi estas mia fileto. Kaj ĝi estas blindulo. Mi havas netolereblan senton.

"Ĉi tie! ĉi tie! ĝuste ĉe la radiko de tiu ĉi cedro."

Klare aŭdiĝas la voĉo de la bubeto en la pluvo. Surprizite mi haltas kaj trovas min jam en la arbaro. Kiel la bubeto diras, io nigra, staranta du metrojn antaŭ mi, ja estas cedro.

"Paĉjo, estis ĉe la radiko de tiu ĉi cedro, ĉu ne?"

"Jes prave," mi senvole konsentas.

"Estis en la 5-a jaro de Bunka*, en la jaro de Drako."

Mi ankaŭ sentas en la koro, "Vere, en la 5-a jaro de Bunka, en la jaro de Drako."

"Estis ĝuste antaŭ cent jaroj; vi min mortigis, ĉu ne?"

Apenaŭ mi aŭdis ĉi tiujn vortojn, konscio subite ekvekiĝis en mia kapo, ke mi antaŭ cent jaroj, en la 5-a jaro de Bunka, la jaro de Drako, en la vespero de tia mallumo, mortigis blindulon ĉe la radiko de tiu ĉi cedro. Kaj ĝuste kiam mi ekrimarkis, ke mi vere estas mortiginto, la knabeto subite fariĝis peza sur mia dorso kiel ŝtono de Zizo**.

* La 5-a jaro de Bunka: 1808.

** Zizo (Jizo): sanktulo Ksitigarbo, kies ŝtonstatuoj estas ĉie troveblaj en Japanujo (vidu en Enciklopedieto Japana, sub "Jizo").

La deka nokto

Kenĉjo vizitis min por sciigi, ke Syōtarō ne-atendite revenis fine en la sepa vespero de kiam li estis forlogita de iu virino, kaj ke li nun pro subita febro kuŝas en mortlito.

Syōtarō estas en la kvartalo la plej bela, bonanima kaj honesta. Li havas nur unu emon. Ĉiuvespere li sidas en la fruktvendejo kun panama ĉapelo sur la kapo kaj admire rigardas la vizaĝon de preterpasantaj virinoj. Li havas nenian alian karakteron rimarkindan.

Kiam neniuj virino preteriras, li rigardas fruktojn anstataŭ straton. Jen multe da fruktopecoj troviĝas en la butikoj. Korboj por donaco plenaj de persikoj, pomoj, mespiloj kaj bananoj estas aranĝitaj en du vicoj. Rigardante ilin Syōtarō ĉiam laŭdas, ke ili estas belaj. Kiel komercisto la fruktisto estas la plej bona, li diras. Tamen li mem vivas ĉiam neokupita kun panama ĉapelo sur la kapo.

Ofte li laŭdkritikas orangojn k. a., ke ili havas bonan koloron. Malgraŭ tio li neniam aĉetas fruktojn. Kompreneble li ne senpage ilin manĝas. Li nur admiras iliajn kolorojn.

Iun vesperon unu virino aperis antaŭ la butikoj. Ŝi vestis sin eleganta kiel noblulino. Koloro de ŝia vesto tre plaĉis al Syōtarō; krome Syōtarō estis tiom ravita de ŝia vizaĝo, ke li demetis sian karan panaman ĉapelon por saluti ŝin. Ĝuste tiam la virino diris, montrante la plej grandan korbon plenan de fruktoj, ke ŝi volas ĝin aĉeti. Syōtarō transdonis ĝin al ŝi. Ŝi tenis ĝin en momento kaj diris, ke ĝi estas tre peza.

Car Syōtarō estis neokupita kaj plue afabla, li proponis, ke li portu ĝin al ŝia domo, kaj eliris kun la virino el la fruktvendejo. De tiam li ne revenis.

Kvankam la afero estas pri Syōtarō, tio estas tro kaprica. Maltrankviligite de lia neordinara konduto liaj parencoj kaj amikoj komencis konsiliĝi pri li, tiam en la sepa vespero li ne-atendite revenis. Kaj kiam oni demandis, "Kie vi estis, Syōtarō?" Syōtarō respondis, ke li iris al monto per tramo.

Ili eble devis veturi tre longe per tramo. Laŭ la diro de Syōtarō, for de la tramo ili tuj alvenis al kampo. Estis vasta kampo, kie kreskis nur verdaj herboj. Irante kun la virino sur la herboj, li alvenis subite al la rando de krutaĵo. Tiam la virino diris al Syōtarō, ke li de tie ensaltu en la abismon. Rigardante malsupren li tamen povis vidi nur la krutan muron, sed ne la fundon. Demetante la panaman ĉapelon, Syōtarō dece rifuzis kelkfoje. Tiam la virino diris al li, "Porkoj lekos vian nazon, se vi ne volas senhezite ensalti. Ĉu bone?" Syōtarō treege malŝatas porkojn kaj Kumoemon! Pensante tamen, ke la vivo estas pli kara, li ankoraŭ hezitis ensalti, kiam tie unu porko gruntante aperis. Syōtarō batis devigite la porkon ĉe ĝia nazo per maldika areka bastono, kiun li kunportis. La porko gruntante renversiĝis kaj falis malsupren sur la krutaĵo. Ho! Apenaŭ Syōtarō povas fari unu spiron, alia porko denove aperis kaj alproksimigis al li sian nazon. Syōtarō refoje pro neceso svingis la bastonon.

La porko renversite kun gruntado enfalis en la fundon de l' abismo. Denove alia aperis. Kaj tiam Syōtarō hazarde rigardis foren: Ho! Centoj da miloj, ja nekalkulebla multo da porkoj gruntante alproksimiĝas laŭvice en rekta linio al Syōtarō de malproksima limo de la verda herbejo. Syōtarō pro timo tute tremis. Sed li devigite batadis per la areka bastono la alproksimiĝantajn porkojn atente unu post alia. Je lia miro ĉiu porko tuj enfalas en la abismon, kiam la bastono apenaŭ tuŝas ĝian nazon. Rigardante malsupren, li vidis ke renversitaj porkoj malsuprenfaladas en vico laŭlonge de la muro de la senfunda krutaĵo. Syōtarō eksentis timon, ke li enfaligis tiel multe da porkoj. La porkoj tamen venas senfine. Kvazaŭ densa nuboj, kiu akiris piedojn por paŝi inter la verdaj herboj, sin sekvas gruntante la sennombraj porkoj.


Syōtarō kun ĉiuj kuraĝoj batadis la porkojn ĉe la nazo dum 7 tagoj kaj 6 noktoj. Sed finfine lia energio tute konsumiĝis kaj liaj brakoj estis senfortigitaj kvazaŭ senostulo, kaj li estis katastrofe lekita de porko. Kaj li falis sur la rando de la krutaĵo.

Kenĉjo parolis pri Syōtarō ĝis ĉi tie kaj konkludis, ke tial estas malbone tro rigardi virinojn. Mi ankaŭ tion konsentis. Sed Kenĉjo aldonis, ke li tamen volas ricevi la panaman ĉapelon de Syōtarō.

Syōtarō senhelpe mortos. La panaman ĉapelon ricevos eble Kenĉjo.

ESPERANTLINGVAJ RADIO-ELSENDOJ EN 1965

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por la radio, s-ro G. Largantier, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1965 estis 1807, kompare kun 1622 en 1964 kaj 1701 en 1963. La elsendoj entute daŭris 662.50 horojn, kompare kun 518 horoj en 1964 kaj 534 horoj en 1963. La nombro de stacioj estis 25 en 13 landoj, kompare kun 22 en 11 landoj en 1964 kaj 20 stacioj en 13 landoj en 1963. Tiu ĉi konsiderinda kresko de la nombro de elsendoj kaj horoj de programoj estas kaŭzita ĉefe de la regulaj elsendoj de Radio Pekino, enkondukitaj en 1965, kaj de la reenkonduko de la Esperanto-elsendoj en Radio Bern. CED antaŭvidas, ke en 1966 la nombro de elsendoj denove kreskos pro la ĉiutagaj disaŭdigoj de Radio Budapeŝto. Same kiel en la antaŭaj jaroj, la plej grandan nombron da elsendoj havis Radio Varsovio: 365 en la daŭro de 182,30 horoj.



Tiel kreskis la suma daŭro de la radio-elsendoj en Esperanto dum la 15 jaroj post la fondiĝo de CED. Nova, iom granda kresko estas antaŭvidebla en la nuna jaro.

LISTO DE LOKAJ ESPERANTO-SOCIETOJ

Kiel konate, en 1964 CED entreprenis vastan enketon pri la lokaj Esperanto-societoj. Kvanke kelkaj landaj asocioj ne reagis aŭ liveris neadekvatajn informojn, la respondoj ebligis kompili liston de ĉiuj lokaj Esperanto-societoj en 39 landoj. Post atenta revizio de la respondoj, montriĝis ke en tiuj 39 landoj entute funkcias minimume 1299 lokaj grupoj kun minimume 36 346 membroj. Tiun tutan materialon necesis atente ordigi kaj transskribi, kio postulis multajn horojn da laboro. Nun aperis en la Dua Parto de la Jarlibro de U.E.A.

por 1965 kompleta listo laŭ la landoj kaj urboj. Por ĉiu loka societo estas donitaj jenaj indikoj: nomo, nombro de membroj, koresponda adreso, loko, tago kaj horo de la regulaj kunvenoj.

La celo de la enketo kaj de la publikigo de la rezultoj ne estas nur doni superrigardon pri la stato de la Esperanto-organizaĵoj sur la loka nivelo, sed ankaŭ kuraĝigi ilian laboron, kiu havas unuarangan gravecon por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo. La listo ebligas al ĉiu loka societo establi daŭrajn kontaktojn kun la lokaj organizaĵoj de aliaj landoj. Tio, se taŭge organizita, povas helpi al vivigo de la interna vivo de la grupo. Esence saman celon havas la broŝuro pri la Loka Esperanto-Societo, kiu ĵus aperis en la eldono de U.E.A.

ESPERANTO-STRATOJ

En la serio A/V de CED ĵus aperis la dokumento A/V/3, kiu prezentas aktualan liston de la stratoj kaj placoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. La dokumenton preparis la kunlaborantoj de CED s-roj Rodari Ermigi kaj Renato Pennazio. La dokumento montras, ke entute ekzistas 291 tiaj stratoj en 25 landoj, nome: Francujo 48, Brazilo 36, Bulgarujo 34, Pol. 34, Ital. 31, Germ. 20, Hisp. 16, Ned. 14, Hung. 13, Aŭstrujo 9, Israelo 9, Sov. 5, Arg. 4, Belg. 3, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavio kaj Norvegujo po 2, Aŭstralio, Finnlando, Kanado, Libano, Nov-Zelando, Svedujo kaj Svisujo po 1. La listo povas doni konkretan apogon al klopodoj nomigi pliajn stratojn laŭ Zamenhof aŭ Esperanto.

ENKETO PRI LA KATEDROJ KAJ LEKTORATOJ DE ESPERANTO

En la decembra numero de "Esperanto" estas donitaj detaloj pri tiu enketo, kiun nun faras por CED ĝia kunlaboranto prof. J. Régulo-Pérez. CED ankoraŭfoje afable petas ĉiujn profesorojn, docentojn aŭ lektorojn, kiuj instruas Esperanton en la universitatoj aŭ samgradaj altlernejoj, tuj kontakti prof. J. Régulo-Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj. La enketo devas nepre esti finita antaŭ junio 1966, por ke kiel eble plej kompleta trarigardo povu esti prezentita al la Dua Lerneja Konferenco en Graz fine de julio 1966.

SLIPARO PRI SCIENCISTOJ-ESPERANTISTOJ

S-ro Wim De-Smet, Drogenberg 36, Overijse, Belgujo, kiu faras por CED enketon pri tiu demando, afable petas ĉiujn sciencistojn-esperantistojn, la kunlaborantojn de CED kaj ĉiujn aliajn, kiuj povas helpi per informoj, tuj kontakti lin je la supra adreso.

(daŭrigo dekstre)

LASTAJ PROGRESOJ DE LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO



Lastaj monatoj de la kampanjo

Je la momento de ekspreso de ĉi tiuj linioj restas ne multe pli ol tri monatoj ĝis la fina limdato de la subskribo-kampanjo por la Propono de UEA al Unuiĝintaj Nacioj: 31 julio 1966. Laŭ la plej nova statistiko de la Centra Oficejo, ĝis nun alvenis entute 754 060 individuaj subskriboj el 67 landoj. Tiu cifero ankoraŭ multe povos kreski ĝis la fino de julio, se nur ĉiuj kolektantoj faros lastan fortostreĉon, provos kolekti en novaj medioj ĝis nun netuŝitaj kaj resendos ĝustatempe la foliojn plenigitajn al la C.O. en Rotterdam. Ĉi-foje ni devas emfazi, ke la limdato ne plu estas elasta: la subskribojn necesos fine kaj definitive nombri antaŭ la transdono de la Propono en Nov-Jorko en oktobro. Pro la koincido de la kongresa sezono, la laboro en la C.O. estos streĉa kaj neprokrastebla. Tial ni insiste petas ĉiujn, kiel eble plej baldaŭ resendi al la C.O. ĉiujn — eĉ nur parte — plenigitajn foliojn, kaj ne atendi ĝis la limdato mem.

Kelkaj miloj da folioj kun Esperanta, angla, franca aŭ hispana teksto restas ankoraŭ je dispono. Oni petu ilin de la C.O.

Pliaj eminentuloj

Lastatempe subskribis: Arthur Haulot, prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Oficialaj Turismaj Organizaĵoj; d-ro Alfred Dregger,

prezidanto de la Unuiĝo de Germanaj Grand-urboj; Aase Bjerkholt, norvega eksministino; Bulle Helmut, ministro en la sarlanda registaro; la urbestro de Munkeno.

Grava kolektiva subskribo estas tiu de la belga "Volksunie", t.e. Popola Unuiĝo, la flandra nacia partio (11 880 membroj). Ankaŭ el Pollando venis antaŭinformo pri subskribo de pluraj gravaj organizaĵoj, sed detaloj ankoraŭ mankas.

Novaj rekorduloj

Altiĝis ĝis 23 la nombro de personoj, kiuj kolektis minimume 1000 individuajn subskribojn. Aldoniĝas al la listo: prof-oj Jacob (1 800) kaj Vanbreuse (1 580), Belgujo; s-ro Monrad Christensen (1 000), Danlando; Jos. Hérion (1 060), Remy Van Eynde (3 640) kaj Hendrik De Roover (1 700), Belgujo. Aliaj ĝis nun ne menciitaj bv. sin anonci.

La gazetaro atentis

Laŭ statistiko de CED entute aperis ĝis la 1-a de aprilo 1 560 artikoloj kaj informoj pri la JIK aŭ en ligo kun la JIK en nacilingvaj gazetoj kaj revuoj, dank' al agado de la Esperanto-organizaĵoj. Certe en la venontaj monatoj, precipe okaze de la transdono de la Propono al U.N., la nacilingva gazetaro volonte akceptos pliajn materialojn de la informaj fakoj. Ni ne maltrafu la okazon!

NOVAJ DOKUMENTOJ DE CED

El la lastatempe eldonitaj aparte menciinda dokumento estas la informaro rilate la kunlaboradon de U.E.A. kun Unesko en la periodo 1964-1965. Apartan signifon havas la dokumento, kiu entenas la raporton pri la kontribuo de la Esperanto-Movado al la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Donacoj por CED	£	ŝ	p
Gesinjeroj Laurie, Britujo	4—	0—	0—
S-ro E. F. Dean, Britujo	5—	0—	0—
S-ino R. Seddon, Britujo	2—	0—	0—
S-ro L. G. Hartridge, Britujo	10—	0—	0—
Anonima donacinto, Britujo	2—	0—	0—
S-ro E. F. Dean, Britujo	5—	0—	0—
F-ino H. van Weerd, Belgujo	0—	9—	0—
S-ro W. Spaander, Nederlando	0—	10—	0—
S-ro Armand Su, Ĉinujo	1—	1—	7—
"Interparl", Usono	2—	1—	1—
S-ro H. W. Holmes, Britujo	2—	10—	0—
S-ro E. F. Dean, Britujo	5—	0—	0—
Esperantista Rondo Utrecht, Ned.	5—	0—	0—
	£ 44—	11—	8—

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Apartan dankon al tiuj donacintoj, kiuj regule finance helpas al CED. Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.


RADIO ROMA. 30-IV, Tra la literaturo; 7-V, Novaĵoj el Italujo; 14-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-V, Italaj belartaj urboj: Catania; 28-V, Kristana mondo; 4-VI, La itala poetino Gaspara Stampa; 11-VI, Italaj regionoj: Liguria; 18-VI, La granda itala skulptisto Gian Lorenzo Bernini; 25-VI, Leterkesto. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Atentu pri novaj ondlongoj: 30.90 m (9710 kcs), 25.20 m (11905 kcs), kaj pri la ŝango de dimanĉo al sabato!

RADIO PEKINO nun disaŭdigas sian programon per la jenaj ondoj: al Eŭropo vendrede kaj sabate de 20.00 ĝis 20.30 per ondoj 48 m kaj 42 m; al Koreujo kaj Japanujo sabate kaj dimanĉe de 11.00 ĝis 11.30 per ondoj 48 m kaj 41 m; al sudorienta Azio sabate kaj dimanĉe de 12.30 ĝis 13.00 ondoj 30 m kaj 25 m. Precizaj ondlongoj kaj frekvencoj (kcs) ne estas diskonigataj.

POLA RADIO en Varsovio nun uzas la jenajn ondlongojn por disaŭdigi la ĉiutagan programon de 15.30 ĝis 16.00: 50.42 m (5950 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

ESPERANTO
EN RADIO

esperanto
majo 1966



I. Szerdahelyi

Esperanto 1, de Szerdahelyi István. Eld. Tankönyvkiadó, Budapest, 1965. 212 p. 24 x 17 cm., il., kartonbind. 10 000 ekz. Lernolibro por 10-14 jaruloj, plejparte rektametoda.

Ĉi tiu libro estas la unua, kiun la aŭtoro skribis por lerneja instruado. Nuntempe ne ekzistas libro en Hungarujo, kiun oni pli bone povus uzi kaj en la popollernejoj kaj en la mezlernejoj. Ne nur en landa, sed ankaŭ en monda rilato ne aperis ankoraŭ tiel bone el-laborita libro por lerneja instruado.

La lernolibro konsistas el du ĉefpartoj. La Unua Parto enhavas 24 lecionojn por 2 jaroj. La materialo por la unua jaro havas 12 lecionojn sur 82 paĝoj kun nur esperantaj tekstoj. La materialo de la dua jaro same enhavas 12 lecionojn sur 55 paĝoj. (Mi tuj rimarkas, ke la libro ŝajnas esti neproporcia.) La duajara materialo estas jam dulingva. La Dua Parto de la libro enhavas dulingvajn eksplikojn, ekzercojn, domajn taskojn, gramatikon kaj esperant-hungaran vortaron.

La unulingvecon de la unua parto la aŭtoro solvis tiamaniere, ke la gramatikaĵojn li "projekciis" sur la margenon. Tio ebligas al la instruanto trarigardon de la gramatika materialo. Ĉar ne ekzistas vortaro por la unuopaj lecionoj, la instruanto mem devas elekti la vortojn instruotajn dum unu leciono. El praktika vidpunkto tio ne plaĉas al mi, ĉar oni perdas tempon serĉante la vortojn aŭ dum la leciono aŭ hejme. Estus pli bone havi vortaron.

En la dua ĉefparto de la libro mi ne kontraŭas la abundan tradukmaterialon el la nacia lingvo (kvankam tio estas kontraŭ la principoj de la moderna lingvoinstruado), ĉar ili helpas la lingvan konscion de la lernanto per la kontrasto inter la lernota fremda lingvo kaj la propra nacia lingvo.

Eble la plej granda valoro de la libro estas, ke ĝi altrudas memstaran laboron al la lernanto, ĉar la instruanto nur Esperante parolas kaj ekzercigas dum la lecionoj.

Andreo Gauder (Hungarujo)

En la flamoj voluptaj de l' amo, poemoj de Diego Selso. El la hispana tr. la aŭtoro. Eld. la aŭtoro, Argentino, 1966. 32 p. 21 x 16 cm., multobl.*

Al la demando, kial li verkas, la aŭtoro respondas jene (p. 21a)

"Demandu al rozuj' kial ĝi floras,
kaj al floroj la kialon de l' aromo.
Ĉu respondis blonda sun' kial ĝi brilas?
Ĉu malkaŝis mondoj, kial ili turnas?

Do, en prozo dirite, li verkas, ĉar li ne povas ne verki. Tio nepre estas la sola respondo, kiun povas doni vera poeto. Kaj ĝi estas sincera. Lia sentema animo facile entuziasmiĝas, kaj la premantan troabundon de sia entuziasmo li simple verŝas sur paperon. Mi diras "simple", ĉar li ne dediĉas tro multe da peno al la formo, eble hastante, por ke la imagoj, naskiĝintaj en lia fantazio, ne perdu sian freŝecon. Tiurilate li sukcesas.

Tamen tiu leganto, kiu serĉas en la poemo provon, solvi iun aktualan problemon de la homo, ne estos kontentigita, ĉar la liriko de D. Selso ne estas kontemplema. "Li kantas kiel kantas bird'", kio en la koro, tio en la kanto.

Alvoko de l' silento, poemoj de Leandra Rekareo. El la hispana tr. Diego Selso. Eld. la tradukinto, Argentino, 1966. 32 p. 21 x 16 cm., multobl. Dulingva eldono.*

Rekareo estas poeto, mense tre parenca al Selso, kio evidente estas bazo de ilia feliĉa kunlaboro. Sole la "Alvoko de l'silento" montras pli da melankolio, kio tamen povas esti nur spegurbildo de momenta malbonŝanco en la vivo. Oni ne povas eviti la impreson, ke iam la silento povas esti sufiĉe parolema.

Ed. Felix (Prago)

Broŝuro sen titolo. Eld. Fondaĵo Anne Frank, Amsterdam, Prinsengracht 263. 1965. 36 p. 13 x 21 cm., il. 2,— gld.

Jam de kelka tempo la Anne-Frank-fondaĵo faras konkretajn provojn apliki Esperanton en sia agado. Nun ĝi povas disponigi al la vizitantoj de la Anne-Frank-domo kaj al ĉiu, kiu interesiĝas pri la fondaĵo, ankaŭ esperantlingvan gvidlibron. Laŭ enhavo kaj ĝenerala aranĝo tiu lasta estas io multe pli ol simpla muzea "turista" gvidlibro; ja ankaŭ la Anne-Frank-domo ne estas simpla muzeo, sed "instigo por pluenporti la kredon, la esperojn kaj la atendojn de infano, kies voĉo sonis pli malproksimen ol la tondrado de kanonoj."

Kvankam relative modesta laŭ amplekso, la broŝuro donas ekstreme kompletan bildon pri la verko, la domo kaj same pri la celoj kaj esenca aktivado de la Anne-Frank-fondaĵo. En la libreto ĉiu trovos, eĉ se li jam legis la taglibron kaj vizitis la domon de Anne Frank, interesajn faktojn kaj novan impulson al konsideroj pri tiu tempo de kruela kontraŭhoma diskriminado kaj al agado por ĝin nepre eviti estonte.

S. Simeonov (Bulgarujo)

Inter du mondepokoj, traktaĵo de Martinus. El la dana tr. Ib Schleicher. Eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1965, 95 p. 19 x 12 cm., bind. 4,70 gld. (18,8 st.)*

Resumo: En la kosma ciklo de la homara sortostato, analoga al la ciklo de la sezonoj k.a., la pasintaj jarmiloj apartenis al la "vintra" epoko, kiam regis militemo kaj la plimulto de la homoj estis "kosme senvivaj". Sed la "printempo" nepre sekvos.

Veterano? de Ismael Gomes Braga. Dua eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, 1965. 231 p. 18 x 14 cm., bind. 1500 ekz. 12,— gld.*

En 62 artikoloj kaj artikoletoj, parte jam aliloke aperintaj, tuŝas la brazila pioniro diversajn aspektojn de la Esperanto-movado, kiel li ĝin observis dum sia pli ol duonjarcenta aktiveco. Pasas antaŭ ni kompleta galerio de ĉiuj, kiuj meritis pri la ekesto kaj marŝo de Esperanto en Brazilo, vere enviinda konciza historio de nia afero en tiu vasta lando. El ĉiu linio ŝprucas la forte bazitaj kaj tial nedetruiblaj kaj per nenio ŝanceleblaj entuziasmo kaj konvinko, kiuj devas infekti la leganton. Kaptas intereson la sprita, ofte nova vidpunkto pri iuj fundamentaj aŭ detalaj problemoj, kiujn ni ĉiuj renkontas kaj provas solvi. Eĉ humuro ne mankas. Spaco ne permesas citon, sed legu ekz. la 37-an paĝon! Aŭ kion vi diros pri la nun pli ol 100-jara Karlo Gomes de Sousa Shelders, kiu lernis Esperanton en sia 90-a jaro kaj rapide finlernis ĝin? Vi trovos en la libro lian vivhistorion, kiel li ĝin rakontis dum malofta jubileo de "Ora edziniĝo" de sia filino. Al ĉiu oni povas rekomendi legon de la libro, ĉu por akiri konvinkon pri ĝusteco de la vojo irata aŭ eventuale por firmigi en si tiun konvinkon.

Ota Ginz (Israelo)



Ismael Gomes Braga en la redakto de "Esperanto-Press", informoficejo en Rio de Janeiro. Al liaj lernolibroj, vortaroj kaj artikoloj la brazila movado ŝuldas multajn el siaj atingoj de la lastaj jardekoj

Dicionário Português-Esperanto, de Ismael Gomes Braga. Dua eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, 1965. 362 p. 18 x 14 cm. 5000 ekz. Bind. 9,— gld.*

La kvaliton de la vortaro garantias la eminenteco kaj bonfamo de la kompilinto Ismael Gomes Braga.

La nova eldono estas reviziita, kompletigita kaj plibonigita. La evidenta diferenco inter la du eldonoj estas: en la dua eldono ĉiuj portugalaĵoj havas E-tradukojn, dum en la unua eldono la portugalaĵoj egalaj aŭ similaj al tiuj Esperantaj estis enregistritaj sen traduko.

La vortaro fariĝus pli kompleta, se ĝi estus provizita per pli da parolturnoj kaj ekzemploj, kiel ekzemple ĉe "Dicionário Português-Inglês" de Michaelis (New York, 1953).

La preso tre agrable impresas. La bunta kovrilo min iom surprizis. Unuavide ĝi impresis min ne kiel vortaro, sed kiel fantaziriĉa romano.

Armand Su (Ĉinujo)

NOTO

El japana literaturo, pri kiu aperis recenzo en la aprila "Esperanto", kostas 19,50 gld. (78 st.). La prezo indikita en la katalogo "Elektitaj libroj en Esperanto" estas do erara.

Magia peniko. 1965. 32 p. 20 x 18 cm. 0,75 gld
Ĉasado kun Avĉjo. 1965. 20 p. 17 x 19 cm. 0,50 gld.
Malsaĝa avo. 1965. 16 p. 21 x 18 cm. 0,50 gld.
La varma sudo kaj frosta nordo. 1966. 20 p. 19 x 14 cm. 0,40 gld. Ĉiuj de Fremdlingva Eldonejo, Pekino.*

"Magia peniko" estas alloga, arte prezentita bildrakonto enhavanta dozeton da politiko. Malriĉa sed talenta knabo (la bonulo!) kun la helpo de magia peniko venkas riĉan, malagrablan kaj monavidan mandarenon (la malbonulon!). "Ĉasado kun Avĉjo" estas bele ilustrita porinfana historieto pri nordorienta Ĉinujo. La granda litertipo multe faciligas la legadon. "Malsaĝa avo" enhavas du bildrakontojn pri la homa persistemo. En la unua oni lernas kiel translokigi montojn, kaj en la dua kiel fari kudrilon el fera stango. Ne mankas spaco por la tekstoj, kaj por la helpo de la tre juna aŭ maljuna leganto mi preferus vidi aŭ pli larĝajn interliniajn spacojn aŭ pli grandan litertipon. En la bildrakonto "La varma sudo kaj frosta nordo" du junaj geamikoj disigas unu al norda Ĉinujo kaj la alia al la sudo. Per la telefono ili regule interŝanĝas informojn pri kontrastoj de klimato kaj moroj inter la du landpartoj. Novorda patriotismo konkludas, ke "De la Sudo ĝis la Nordo ĉie regas nova ordo." La libreton mi aparte rekomendas pro la praktika kaj ĉiutaga karaktero de ĝia vortprovizo. Ĉiuj kvar libretoj taŭgas por lernejoj en la dua studjaro de Esperanto.

R. H. M. Markarian (Britujo)

esperanto
majo 1966

LAŬFAKE

Historio

● Fondiĝis "Internacia Historiista Fakgrupo" (IHFG), korespondadreso ĉe d-ro E. J. Görlich, Pf. 70, A-1094 Wien, Aŭstrujo. Ĝi celas unue kompili terminaron kaj prifaŝisman bibliografion, poste ev. eldoni bultenon. Kunlaborantoj bonvenas.

Instruistoj

● La Pedagogia kaj Didaktika Sekcio de ILEI ellaboras unuecan ekzamenan sistemon aplikeblan en ĉiuj landoj. Informojn pri diverslandaj ekzamensistemoj kaj proponojn pri la nova petas (plej malfrue ĝis 1 julio 1966) d-ro I. Szerdahelyi, Budapeŝt VIII., Szigetvári u. 22.II.4, Hungarujo.

Literaturo

● En la revuo "Babel", angla-franca organo de la Internacia Federacio de Tradukistoj, kiun ĝi eldonas kun helpo de Unesko, aperis franc-lingva artikolo de K. Kalocsay, "Tradukado en Esperanto".

Radio

● En internacia kunveno de radio-amatoroj en Knokke-Zoute, Belgujo (16-18 sept. 66) okazos renkontiĝo de esperantistoj. Informas S-ro K. Poupeye, ON4PU, Karel de Stoutelaan 78, Brugge, Belgujo.

LAŬLANDE

Belgujo

● La ambasadoro de Aŭstralio, s-ro Ralph L. Harry, membro de UEA, vizitis je la 2-a de marto lernejon en Verviers, kies lernantoj korespondas per Esperanto kun aŭstraliaj geknaboj, kaj partoprenis la lecionojn de Esperanto kaj de geografio.

Bulgarujo

● Ekde la pasinta marto la estraro de la Domo de la Turisto kaj Alpisto en Sofio okazigas ĉiumonatajn vesperojn pri turismo kaj Esperanto.

Ĉeĥoslovakujo

● La unua libro-forma belliteratura eldonaĵo el tiu lando de post la Dua Monda Milito aperos komence de 1967: nova eldono de la "Sileziaj Kantoj" de Petr Bezruč.

Germanujo

● La Esperanto-grupo de Oberkirch (Lohmühlweg 1, D-7602 Oberkirch) invitas al internacia somera kunveno la 2-3 julio 1966. Distraĵoj kaj ekskurso.

● Germana E-Asocio decidis starigi Centran Esperanto-Bibliotekon en Nürnberg. Tiuj, kiuj volus al ĝi donaci librojn, bv. kontakti kun la C.O. de GEA, 85 Nürnberg 2, Welserstr. 69.

● Esperanto-kunvenon dum la printempa foiro de Leipzig partoprenis ĉ. 150 personoj el diversaj landoj. Nuntempe pli ol mil personoj en Orienta Germanujo lernas Esperanton en 90 kursoj — inter ili unu ministro.

Hungarujo

● Okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝt la hungara poŝto eldonos specialan poŝtmarkon en valoro de 1,— forinto. Ĉe la landlimo kaj en ĉefurbaj stacidomoj funkcios informservoj por kongresanoj.

Kongo

● Nova Esperanto-klubo formiĝis en St. Jean (Léopoldville). Ĝi serĉas kontakton kun alilandaj grupoj per la adreso: s-ro David Salambi, rue Kasongo-Lunda 249, St. Jean.

Nederlando

● La sekcio Groningen de la landa asocio LÉEN festos la 4-an kaj 5-an de junio sian 40-jarecon per ekskursadistra programo. Gastoj bonvenaj.

Sovetunio

● La Litova Akademio de Sciencoj konsideras eblan aperigon de Esperanta traduko de la idilia poemo "La Jaro" de la klasika litova verkisto Kristijonas Donelaitis (1714-80). La poemo ampleksas preskaŭ 3000 versojn.

Lerneja inspektoro rigardas la Esperant-lingvan filmon "Aŭstralio hodiaŭ" kune kun la aŭstralia ambasadoro (dekstre) kaj lernantoj en Verviers (vidu sub Belgujo).



Verve deklamis Julio Baghy el siaj propraj plej popularaj poemoj, kiam la Hungara Pedagogia Esperanto-Sekcio solenis lian 75-jariĝon en Budapeŝt. Dekstre: prezidanto de H.P.E.S., d-ro Ferenc Jáki; maldekstre: K.K.S. Glauco Pompilio, kiu bondeziris en la nomo de UEA.

51-a UNIVERSALA KONGRESO
Budapest, 30.VII - 6.VIII.1966

Sub la Alta Protektado de S-ro Ödön Kishazi,
Vicprezidanto de la Hungara Popola Respubliko
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

Vizo

Ni refoje atentigas (vidu aprilo, p. 76), ke ne plu necesas invitletero por ricevi la hungaran vizon, sed sufiĉas montri la kongresan karton. La diverslandaj ambasadoj estas pri tio oficiale informataj el Budapest — per ministra letero de 25 marto 1966; se vialanda ambasado ne jam scias la novan regulon, atendu iomete antaŭ ol formale peti la vizon. Tio validas ankaŭ rilate la 50-procentan rabaton de la vizo-kosto por kongresanoj. La rabatita prezo de la vizo estas 1,50 us. dol.

Internacia Somera Universitato

En ISU okazos entute dek prelegoj. Rektoro estos prof. Géza Bárczi, eminenta hungara lingvisto. Prelegos prof-oj E. A. Bokarev, Stojan Djoudjeff, Ivo Lapenna, Tadao Umesao, Imre Ungár, J. Vrančić, G. Waringhien kaj Ye laishi, asistento Aŝvinikumar' kaj d-ro I. Szerdahelyi. Ĉiuj prelegoj okazos en la kadro de la Tria Internacia Arta Festivalo, kaj rilatos al artaj, literaturaj kaj lingvistikaj temoj.

Tria Int. Arta Festivalo

La programo inkluzivos prezentaĵojn de Internacia Arta Teatro, Bulgara Esperanto-Teatro

(klasika bulgara verko) kaj Teatro Populara de Łódź (la usona verko "Kataki", jam sukcese enscenigita en Tokio). Menciinda estas ankaŭ la Ŝtata Pupoteatro de Budapest, kies lerto-plenaj prezentoj celas unuavice plenaĝan publikon.

Foto-konkurso

Same en la kadro de la Arta Festivalo okazos foto-konkurso laŭ la temo "Infanoj ne konas limojn". Konkursaĵojn oni sendu plej malfrue ĝis la 1-a de julio 1966 al la 51-a Universala Kongreso de Esperanto (Foto-konkurso), Kenyérmező u. 6, Budapest, VIII., Hungarujo.

Oni rajtas konkursi per maksimume 5 koloraj diapozitivaj (4 x 4 cm., inkl. de kadro) kaj/aŭ nelimigita nombro da nigrablankaj fotoj (maks. 13 x 18 cm.). Faka juĝantaro prijuĝos la konkursaĵojn laŭ (1) originaleco, (2) bona esprimo de la temo, (3) foto-tekniko.


La premiitaj fotoj apartenos al UEA. Por resendo de nepremiitaj fotoj oni antaŭpagu la afrankon (por fotoj: min. 3 rpk.; por diapozitivaj: min. 2 rpk.).

Statistiko (ĝis 19 aprilo 1966)

Alĝ. 1, Arg. 2, Aŭstral. 3, Aŭstrujo 39, Belg. 41, Braz. 2, Brit. 123, Bulg. 129, Ĉeĥ. 256, Dan. 52, Finn 46, Franc. 266, Germ. 346, Grek. 6, Hisp. 12, Hong. 1, Hung. 406, Irl. 2, Isr. 7, Ital. 102, Jap. 31, Jug. 43, Kanado 2, Meks. 1, Monako 3, Ned. 125, Norv. 10, NZ 4, Pol. 54, Rum. 16, Sov. 13, Sved. 116, Svis. 27, Turk. 1, UAR 1, Urug. 1, Usono 41 Entute 2331 el 37 landoj.



esperanto
majo 1966



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

La kvardekkvina Bonvolmesaĝo de la Junularo de Kimrujo al la junularo de la mondo, dissendenda je la "Tago de Bonvolo", la 18-a de majo 1966:

JEN KIMRUJO! La geknaboj de Kimrujo vokas la geknabojn de la mondo je la tago de bonvolo.

Unu el la plej signifoplenaj trajtoj de nia tempo estas la fervora deziro de ĉiuj popoloj por justa disdivido de la avantaĝoj de la moderna mondo, ĝiaj privilegioj kaj ĝiaj respondecoj.

Ni komprenas, ke ĉi tiuj avantaĝoj ne estos

gajnitaj sen granda penado kaj aktiva bonvolo fare de ĉiuj: bonvolo por kundiskuti kaj klopodi pri interkonsento, kaj penado por evoluigi la rimedojn per interŝanĝo de scipovo kaj spertado. Ĉi tiu respondeco kuŝas sur la naciaj registaroj.

Sed la mondo bezonas ankaŭ la helpon de la junularo, kaj ni ne dezirus deteni nian kontribuon. Ni do, la junularo de ĉiuj nacioj, kuniĝu en entrepreno de libervola servado, hejme kaj alilande, al la maljunuloj kaj la nekapabluloj, al la malsanuloj kaj la malriĉuloj, al ĉiuj, kiuj estas senprivilegiaj. Tiu maniere ni ankaŭ ludos nian rolon en la luktado por ŝanĝi malriĉecon en abundecon, malesperon en energion kaj malsanecon en vivoforton." (La mesaĝo de 1965 vekis kunlaboron kaj reagon de esperantistoj en Pollando, Germanujo, Bulgarujo, Francujo, Nederlando, Urugvajo, Sovetio, Usono kaj Britujo. Tiel informas la ĉi-jara broŝuro de la Kimra Junularo, havebla ĉe: Goodwill Message, Swyddfa'r Urdd, Aberystwyth, Kimrujo/Wales)



P.E.C.S. = Programo Estos Certa Sukceso

Almenaŭ tion supozigas la lastaj novaĵoj pri la 22-a IJK.

Futbal-maĉo: La 27-an de julio interbatalos Kongresa kaj loka teamoj. Kuraĝuloj bonvolu averti LKK-on pri sia preteco defendi la kongresan Honoron, kaj je kiu posteno li/ŝi deziras ludi. LKK prizorgos la necesajn ekipaĵojn.

Parada marŝo tra la urbo kun lampionoj (24.7) fariĝos kiel eble plej impona kaj amuza. Post alveno sur la ĉefplaco, la reprezentantoj de la lokaj aŭtoritatoj salutos kaj bonvenigos la ĉeestantaron. Kiu povas, bonvolu porti popolkostumon kaj kunporti muzikilojn.

Diskutoj: du okazoj por diskutado (temoj anoncotaj) estas ŝovitaj en la programon, je 25 kaj 26 julio.

La tuttaga ekskurso al Harkány kaj Siklós okazos 28.7, ne 27.7.

Por eviti eventualan miskomprenon ni kon-

firmas, ke la kongreskotizo inkluzivas: loĝadon en studentaj loĝejoj de 23.7 ĝis 30.7, manĝadon trifoje tage (inkl. vespermanĝo je 23.7 kaj lunĉo je 30.7), kaj partoprenon en ĉiuj aranĝoj de la kongreso, inkl. aŭtobusbiletojn por la ekskursoj. **Ne eblas** ĉeesti kaj pagi la kongreson nur parte.

Okcidentanoj atentu la informon pri la hungara vizo en "Esperanto" de aprilo, p. 76.

En la tuta urbo Pécs jam ekzistas 32 kursoj de Esperanto. Eĉ policistoj, vendistoj, kelneroj, ktp. lernas, por konvene servi vin. Venu ankaŭ! Informojn petu de: 22-a IJK, pf. 114, Pécs, Hungarujo.


Letero el Rio.

Nome de **GUANABARA ESPERANTO-JUNULARO** ni vin salutas! Nia juna asocio naskiĝis je 24.10.65, tago de UN, okaze de la XIX-a Brazila E-kongreso, sed oni vere eklaboris en januaro ĉijare. Ni eldonis portugallingvan prospekton: "**Esperanto por komencantoj**" kun la ĉapitroj: "Esperanto, lingvo internacia", "La historio de Esperanto", "Esperanto kaj la naciaj lingvoj", "Esperanto en la mondo" kaj "Esperanto en Brazilo". Informadreso troviĝas sur la lasta paĝo.

Ni ankaŭ havas monatajn programojn: tiu por marto enhavas 6 kunvenojn, vizitojn kaj ekskursojn. En aprilo ni ekaperigos nian oficialan trimonatan bultenon "**Meteoro**".

Ni jam starigis rilatojn kun TEJO. Eble ni fondos post 2 jaroj, okaze de la XX-a Brazila E-kongreso, landan sektion de TEJO en Brazilo.

Kun bondeziroj ni salutas vin: Guanabara Esperanto-Junularo, Caixa Postal 18, ZC-OO, Esperanto, RIO DE JANEIRO, Brazilo. Estraro: Paulo Sérgio Viana (prez.), Francisco S. Wechsler (vic-prez.), Alfredo Enio Duarte (sekr.-kas.), Jair Salles (help-vic-prez.), Aloisio Sartorato (help-sekr.-kas.).



Dek kvar artistoj de la Hungara Pupoteatro oficiale en labortempo kun 20 aliaj libere aliĝinte komencis lerni Esperanton. Ili se eble venos al Pécs.

esperanto
majo 1966

MEMORIGA KALENDARO

Majo

- 14-20 IFEF-Kongreso, Utrecht, Nederlando
27-30 Brita (Jubilea) Kongreso, Norwich
27-31 Germana Kongreso en Bamberg
Dana Kongreso en Kopenhago
28-30 Franca Kongreso en 47-Agen (L. et G.)
Belga Kongreso en Lovenio
Sveda (Jubilea) Kongreso en Skövde
28-4/6 Int. Jun. Kunveno de GEJ, Bamberg

Junio

- 3-5 Skota Kongreso en Alloa
30 Limdato por aliĝo al la UK Budapest

Julio

- 1 Limdato fotokonkurso Budapeŝta U.K.
1-3 Kanada Kongreso en Montréal
1-31 Int. Tendaro, Vitoŝa-monto, Bulg.
2-3 Somera Int. Kunveno, Oberkirch, Germ.
3 Sezono de Grésillon komenciĝas
3-28 Tendaro en Lančov, Ĉeĥoslovakujo
17-24 Int. Feriaj Kursoj, Helsingør, Dan.
19-23 Hispana Kongreso en Bilbao
21-24 14-a Kongreso de ELNA, Washington D.C.
21-27 IKUE-Kongreso en St. Gallen, Svisujo
23-24 Aŭstria Esperanto-Konferenco, Graz
23-28 Dua Lerneja Konferenco, Graz, Aŭstrujo
23-30 22-a IJK de TEJO, Pécs, Hungarujo
KELI-Kongreso, Debrecen, Hungarujo
SAT-Kongreso, Swanwick, Britujo
26-30 Ferioj de AEF en Klosterneuburg
27-29 Oficialaj antaŭkongresaj tagoj, Debrecen
30-5/8 Postkongreso SAT-Junularo, Bamford, Brit.
30-6/8 51-a Universala Kongreso en Budapest
10-a Int. Infankongreseto, Budapest

Aŭgusto

- 7-9 Oficiala Postkongreso en Szeged
7-10 Int. Renkontiĝo, Szolnok, Hungarujo
7-13 Naturamika rondovojaĝo tra Aŭstrujo
10-13 Feriaj tagoj en Ljubljana, Jugoslavio
10-20 Int. Pedagogia Seminario, Szeged, Hung.

Septembro

- 3 Sezono en Grésillon finiĝas
4-10 Eŭropa Ferio-Semajno, Boldern, Svisujo.

Oktobro

- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Samouczek języka esperanto (Memlernilo de lingvo Esperanto), de Andrzej Pettyn. Eld. PEA, Varsovio, 1964. 176 p. 20 x 15 cm., multobl.

Studo pri 'deci' kaj 'konveni', de T. Nakamura. Represo el "Oomoto" n-roj 305-8, 16 p. 21 x 15 cm.

Esperanto-konversacioj, de Andrzej Pettyn. Pola E-As., Varsovio, 1966. Unua parto. 118 p. 20 x 14 cm., fotopresita, il. Por internacia uzo.

Rusa-Esperanta vortaro, red. E. A. Bokarev. Eld. "Soveta Enciklopedio", Moskvo 1966. 536 p. 50 000 ekz. 4,— gld. (16 st.)*

Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto, de Andrzej Pettyn. Eld. PEA, Varsovio, 1965. 27 p. 19 x 14 cm., multobl. 0,90 gld. Ampleksigo de la artikolo en "Esperanto" marto p. 42.

4a/5a Int. Ferv. Esp. Skisemajno, Krimml, Aŭstrio. 24 p. 20 x 14 cm. Manlibreto.

Szigetvár. Eld. Baranya megyei Idegenforgalmi Hivatal, Pécs, Széchenyi tér 9/11, Hungarujo.. Turisma kolora prospekto.

Győr. La urbo de la banejoj. Eld. IBUSZ. Senpaga turisma prospekto kvarlingva kun Esperanta aldono. Liveras: Departementa Esperanto-Komitato, Győr 2, P.f. 228, Hungarujo.

Atendas vin Szeged. Eld. Prepara Komitato de la Postkongresaj Tagoj en Szeged, Vörösmarty u. 7, Hungarujo. Senpaga faldfolio.

La Esperanta konjugacio, de Teo Jung. Eld. Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1965. Unua parto, 122 p. 27 x 21 cm. Aĉetebla nur post apero de dua parto.

Anuario — guia 1965. Eld. Argentina Esperanto-Lernejo, Rosario. 27 p. 28 x 22 cm., multobl. Jarkajero kun adresaro.

Diego Varagić kantas en Esperanto. Eld. Jugoslavia E-ligo kaj Radiotelevido Beograd, 1965. Mezdaŭra disko 17,5 cm., 45 t./m.*

Versoj por infanoj, de Nenjo Rimanto. Eld. la aŭtoro. 69 p. 20 x 16 cm., il., ofsetita.

NEKROLOGOJ

LAURI ILMARI LAPPI (1899-1965)

La 22-an de oktobro 1965 mortis d-ro L. I. Lappi, dum longa tempo Delegito kaj FD de UEA, redaktinto de la finnlanda parto de "Enciklopedio de Esperanto".

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

stato je la 31-a de marto

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Hispanujo	2860	2800	97,90
2. Britujo	6691	5089	76,06
3. Francujo	7752	5831	75,22
4. Finnlando	3160	2195	69,46
5. Italujo	4253	2865	67,36
6. Usono	4526	3035	67,06
7. Svislando	2459	1630	66,29
8. Svedujo	7180	4360	60,72
9. Japanujo	3965	2170	54,73
10. Nederlando	5975	3194	53,46
11. Belgujo	2055	1065	51,55
12. Danlando	3099	1540	49,69
13. Brazilo	4142	1820	43,94
14. Germanujo	7221	2765	38,29
15. Jugoslavio	5560	1465	26,35

Konkurso II

1. Kanado	842	800	95,01
2. Aŭstrujo	1475	1170	79,32
3. Aŭstralio	1475	1060	71,86
4. Israelo	460	300	65,22
5. Novzelando	1481	915	61,78
6. Grekujo	270	166	61,48
7. Sudafriko	250	130	52,—
8. Norvegujo	1755	875	49,86
9. Islando	250	95	38,—
10. Argentino	905	160	17,68
11. Madagaskaro	250	30	12,—

(vidu la regulojn sur paĝo 39)

diversaj rubrikoj

esperanto
majo 1966

S-RO HANS JAKOB

La advokato de UEA en Ĝenevo informas, ke la 11-an de marto 1966 la esplorjuĝisto kulpigis s-ron Hans Jakob pro mallojala administrado kaj, alternative, pro misuzo de konfido.

La broŝuro "Kelkaj Historiaj Faktoj pri la Serva Centro de UEA en Ĝenevo" estas ankoraŭ mendebla kontraŭ afranko de la C.O.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Authier, s-ino, Beziers, Francujo.
Bartel, s-ro W., Stockholm, Svedujo.
Bonomi, s-ro P., Verona, Italujo.
Cíchová, s-ino Jana, Praha, Ĉeĥoslovakujo.
Hanney, s-ro Rex, Parkside, Aŭstralio.
Hawley, s-ino Dorothy M., Calgary, Kanado.
Hodge, f-ino F. A., London, Britujo.
Johansson, s-ino Karin, Malmö, Svedujo.
Lavarenne, s-ro Maurice, Clermont-Ferrand, Francujo.
Michau, s-ino Jeanne, Orléans, Francujo.
Olsson, s-ro Nils, Höör, Svedujo.
Sancho, f-ino M. P., Zaragoza, Hispanujo.
Sancho, f-ino S., Zaragoza, Hispanujo.
Wellock, s-ro C., Nelson, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

196 Banham, s-ro F. R., Aŭstralio. 197. Degryse, s-ro André; 198 Kestens, f-ino M.; 199 Lecat, s-ino Rena, Belgujo. 200 Dutra d'Amorim, s-ro Nid; 201 Farias, s-ro B. F.; 202 Melo, s-ro Roskildes Per. de; 203 Nunes, s-ro Elmo Pereira; 204 Pessoa, s-ro Floriano N. de V.; 205 Vaz, s-ro A. J.; 206 Verde, d-ro D. Lima, Brazilo. 207 Atkinson, s-ro G. B.; 208 Berry, f-ino E.; 209 Boatman, s-ro Douglas P.; 210 Crabtree, s-ro E. P.; 211 Eldon, s-ro H. B.; 212 Hockey, f-ino M. J.; 213 Laurie, s-ro E.; 214 Laurie, s-ino W.; 215 Lewin, s-ro Maurice; 216 Miller, s-ro J. R.; 217 Relf, s-ro E. F.; 218 Rogers, s-ro F. J.; 219 Ryan, s-ino Jane S.; 220 Seddon, s-ino R.; 221 Sharp, s-ro G.; 222 Sinclair, f-ino P.; 223 Sly, K. A.; 224 Squire, f-ino E.; 225 Williams, s-ro N., Britujo. 226 Hansen, s-ro E.; 227 Jahn, s-ro C. J.; 228 Lange, s-ro Otto C.; 229 Lassen, s-ro Aug.; 230 Schröder, s-ro Ole, Danujo. 231 Räsänen, s-ro U. A.; 232 Stenholm, s-ro Emil; 233 Teukku, s-ro T., Finnlando. 234 Beau, s-ro Jean; 235 Beliard, s-ro Luc; 236 Bodson, s-ro Claude; 237 Borel, s-ino; 238 Bourdier, f-ino Marie-Hélène; 239 Guillot, s-ro Paul E.; 240 Lemonnier, f-ino G.; 241 Ploussu, s-ro Augustin; 242 Prouza, s-ro Joseph, Francujo. 243 Gründler, s-ro Martin; 244 Hölscher, s-ro Erich; 245 Teltz, s-ro Fritz, Germanujo. 246 Diez Sanz de Andino, s-ro Salvador; 247 Olivan Hernando, s-ro Salvador; 248 Perarnau, s-ro Jaime; 249 Ponsa Veloso, s-ro C.; 250 Solá, s-ro M.; 251 Tónico, s-ro Tomás, Hispanujo. 252 Blöndal, s-ro Björn, Islando. 253 Boscarino, s-ro G. Stan., Italujo. 254 Kocjančič, s-ro Karlo, Jugoslavio. 255 Archell, s-ro Reginald S.; 256 Philip, s-ro A., Kanado. 257 Rousseau, s-ro Henri, Maŭritanio. 258 Holleman, s-ro J. V.; 259 Kroon-Rentinck, s-ino J.; 260 Ponti, s-ro D., Nederlando. 261 Armanis, s-ro

Andrejs; 262 Maarli, s-ro E.; 263 Ringstad, s-ro G., Norvegujo. 264 Barrett, s-ro C. R. S.; 265 Hall, s-ro W. J., Nov-Zelando. 266 Andersson, S-ro B.; 267 Bengtsson, s-ro Arne; 268 Björne-mo, s-ro A.; 269 Emson, s-ino R.; 270 Ericson, s-ro Å.; 271 Hedaeus-Eriksson, s-ino M.; 272 Lindberg, s-ro Erik; 273 Ljungberg, s-ino Astrid; 274 Lundin, s-ro ing. Henry; 275 Näs-lund, f-ino E.; 276 Ohlsson, f-ino Ester; 277 Olsson, f-ino Agda; 278 Persson, s-ro L.; 279 Rytenberg, ing. Eugen; 280 Sjöberg, s-ro Helge; 281 Snarberg, s-ro Jack; 282 Söderberg, s-ro K.; 283 Svård, s-ino Rut, Svedujo. 284 Gross-mann, s-ro H. W.; 285 Zoller, s-ro F., Svisujo. 286 Beard, s-ro Ralph H.; 287 Doneis, s-ro A. F.; 288 d'Estries, s-ino M.; 289 Gerber, s-ro Wm.; 290 Gerson, s-ino M. H.; 291 Kailenta, s-ro John; 292 Larkin, s-ro James J., Usono.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Aŭstralio: Silva, s-ro Bruno Varkauskas, 79,19. Britujo: Davies, s-ro H., 30,—; Garraway, f-ino E., 20,—. Danlando: Frost, s-ro E. J. 6,—. Nederlando: Slösser-Bresler, s-ino B. M., 2,30. Portugalujo: Freitas, S-ro Manuel de, 10,—. Svedujo: Lindström, s-ro, 5,20; Swård, s-ro Erik, 10,42.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Sumo entute ricevita: 22 108,55 gld.

Sumo elspezita: 22 074,99 gld.

Saldo pozitiva: 33,56 gld.

FONDAJO CANUTO

Nederlando: Kos, s-ro K., 1 J-MJ; Stichting Levi Lassen, Den Haag, 25 MA; Zeiler, mag. F., 1 MA.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

FONDAJO AZIO-AFRIKO (Gld.)

Ĉinujo: Su, s-ro Armand, 8,25. Svedujo: Edler, s-ro Per, 15,—.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1966

(Vidu "Esperanto", februaro, p. 36)

A. (16,— gld.): 9. Hartl, d-ro J., Aŭstrujo; 10. Parson, f-ino E., Britujo; 11. Gaston, f-ino M.; 12. Jullien, s-ro M.; 13. Lavarenne, s-ro M.; 14. Louys, f-ino J., Francujo; 15. Hölscher, s-ro E.; 16. Rosenträger, s-ro H., Germanujo; 17. Shanks, s-ro A., Usono.

B. (5,— gld.): 4. Colleu, s-ino M.; 5. Tavernier, s-ro R., Francujo.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Aŭstrujo: Hartl, d-ro J., —,50. Germanujo: Bettges, s-ro J., 4,50; Hölscher, s-ro E., 2,18. Norvegujo: Madsen, s-ro B., 100,—. Usono: Shanks, s-ro A., 1,28.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Ĉu la ideo reenkarigi estas sen ia ligo kun faktoj, aŭ, ĉu ĝi estas fundamentbla per argumentoj de prudento kaj per scienca pensado? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Deziras sonbendajn amikojn, 25- ĝis 35-jarajn, s-ro Donald Crane, "Tecoma", Wallumbilla, Queensland, Aŭstralio. Rapideco 17/8. Homoj en Svisujo, Svedujo, Norvegujo kaj Japanujo preferataj.

1066 — Batalo de Hastings. 1966 — Amuzaj. Bona marborda libertempo: samtempe lernu la anglan lingvon. Skribu al s-ino V. Bateman, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Esperanto-societo Skopje renovigas sian bibliotekon pereintan dum la tertremo en julio 1963. Ni petas: helpu ankaŭ vi sendante almenaŭ unu libron kiun vi ne plu aŭ ne tro bezonas. Anticipan dankon! Adreso: Esperanto-societo "La Progreso", Ul. Vapcarov 17, Skopje, Jugoslavio.

Grandioza ekspozicio de korespondaĵoj en aŭgusto. Materialoj urĝe petataj: 53-a Japana Kongreso, Tohata-tyo 1-51, Syowa-ku, Nagoya.

Juristoj-Esperantistoj! Malhavante kompletan membroliston de la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj, la nova sekretario-kasisto, d-ro Ludwig Röhl, 8884 Höchstädt/Donau, Marktplatz 5, Germanujo, petas tiujn membrojn, kiuj ne ricevis sian bultenon de la 29.1.66 sciigi al li siajn nomojn kaj adresojn.

Publika danko! Ni radioamatoroj esperantistaj esprimas nian sinceran dankon al Kortega Konsilisto Hugo Steiner, ĉefredaktoro de "Informilo" de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, por lia publicista apogo de nia kampanjo "Esperanto en la etero" kun atestimo: D-ro Anton Huemer, radio-amatoro esperantista, OE 5 HML, en la nomo de la radio-amatora Esperantistaro de tutmondo.

Poŝtmarkoj. Deziras interŝanĝi bonajn poŝtmarkojn kun filatelistoj en okcidenta Eŭropo. S-ro M. Wärnö, Box 16, Valla, Svedujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Kiel estas por vi la sento de la vivo? Kontribuu vian tajpitan respondon al: "Sento de la vivo", Trefflé Mercier, App. 5/554, rue Vimy, Sherbrooke, Québec, Canada (Kanado). Ĉiu kunlaboranto ricevos poŝtkarto-ateston. La rezultato de la verko farita nur en Esperanto estos anoncita poste.

Poŝtmarkojn interŝanĝas k.ĉ.l.: Antonio Díaz Moreno, P-º Menendez Pelayo, n-º 19-B, 4-º izqda, Santander, Hispanujo.


Filatelisto deziras interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj — kontraŭ 100/200 diversaj, sendas samon el Francujo. S-ro R. Melo, 6 place J. Ferry, 42-St. Etienne, Francujo.

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Miĥail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj en
Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,- gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

KOMPLETAJ JARKOLEKTOJ

REVUO ESPERANTO 1965 tolbindita volumo, ora surpriso, 224 + 48 paĝoj, konservindaj artikoloj.

Por MA 1965: 7,- gld.; por aliaj: 14,- gld.

LA PRAKTIKO 1965: 7,50 gld. nebindita jarkolekto, 176 grandaj paĝoj, ink. afrankon multaj ilustraĵoj.

Speciala oferto: jarkolekto 1964: 5,- gld.

Rapidu! Ambaŭ kvantoj estas limigitaj!


Reaperis malgranda kvanto de la konata verko de JULIO BAGHY:

VERDAJ DONKIĤOTOJ

kiu enhavas 170-paĝan romanon "Paŭlo Paal" kaj 45 paĝojn da "Karikaturaj". La tole bindita volumo kostas (pro iom makulita papero) nur 2,50 gld. Mendu tuj ĉe la C.O. de UEA.


esperanto kaj ekspozicio 67 multe similas

Ambaŭ estas internaciaj.



Kiam ĝi komencas en Montrealo, Kanado la 28an de aprilo, 1967, Ekspozicio 67 estos la plej grava internacia ekspozicio iam konita. 70 landoj partoprenos en Ekspozicio 67. Ili konkuros en amika rivalado por montri al vi sian plej bonan en serio de grandegaj naciaj pavilonoj. Vi vidos iliajn vivoplenajn dancojn, aŭdos iliajn interesajn kantojn kaj lernos pli ol dumvivaj mondroniroj povus montri al vi.

La temo de Ekspozicio 67 estas "La Homo kaj sia Mondo", la historio de la homa progreso, liaj aspiroj kaj lia estonteco. En mirlando de imagemaj elmontraĵoj, vi vidos la mirindaĵojn de la scienco, de la arto kaj de la industrio. La elmontraĵoj, la vidaĵoj kaj la amuzadoj en Ekspozicio 67 multe superos viajn plej fantaziajn imagojn. Imagu, se vi povas, milionon da reflektataj lumoj, dancantaj sur la akvo, mil flagojn, artajn fajraĵojn, fontanojn kaj orkestrojn.

 **expo67** estos unikaĵo.
Planu nun viziti ĝin.

KANADA KORPORACIO POR
LA 1967 MONDEKSPOZICIO,
MONTREALO, KEBEKO, KANADO.
APRIL 28 - OKTOBR 27, 1967.